

Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, - estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita neniam

Helmuto Velger

Norma

Esperantologio

mento de la lingvo tita de la registaroj per specialaj vivon kaj uzatej personaj kapricoj komitato, interk la rajton fari en por ĉiam ĉiujn deziritajn sangojn, se tiaj sangoj montriĝos necesaj; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto.

Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro ». Tiujn ĉi

Helmuto Velger

**Kontribuoj al la
Norma Esperantologio**

Enkonduko • Ekspertizetoj • Kritikoj

(Oktobro 1999)

**Kun enkonduko kaj komentoj de
Bernhard Pabst**

Esperanto-Akademio

Berlino 2016

Helmuto **Velger** [t.e. Helmut **Welger** (1946-2008)]. Kontribuoj al la Norma Esperantologio. Enkonduko • Ekspertizetoj • Kritikoj (Oktobro 1999). Kun enkonduko kaj komentoj de Bernhard Pabst. Berlino: Esperanto-Akademio 2016.

Kontakto: bernhard.pabst[ĉe]gmx.de (anstataŭigu [ĉe] per @).

Noto pri la kopirajto: La originalo en la iama retejo de Velger havas la indikon „© info-servo r.a. 2001“. Laŭ informo de la *Vereinsregister beim Amtsgericht* (registra oficejo ĉe la tribunalo de unua instanco) de *Marburg / Lahn* la registrita asocio laŭ germana juro (*eingetragener Verein*) estis likvidita en 2011 kaj per administra decido strekita el la registro de asocioj. La kopirajto tial ne plu apartenas al la malaperinta jura persono „info-servo“. Malgraŭ intensivaj esploroj, ni ne kapablis eltrovi, ĉu kaj se jes al kiu ĝi (eble) transiris. Se iu ĝin pretendas, ni petas kontakti nin.

La nuna reeldono havas ekskluzive nekomercan sciencan celon esperantologian. Iu profito estas nek alstrebita, nek akirata. **Ĉia komerca uzado profit-cela estas malpermesita.**

***Hinweis zum Urheberrecht:** Das Original auf der ehemaligen Homepage von Welger hat die Angabe „© info-servo r.a. 2001“. Nach Auskunft des Amtsgerichts Marburg / Lahn wurde der eingetragene Verein im Jahre 2011 aufgelöst und von Amts wegen im Vereinsregister gelöscht. Das Urheberrecht liegt somit nicht mehr bei „info-servo e.V.“. Trotz intensiver Recherchen gelang es bisher nicht, einen etwaigen Rechtsnachfolger zu ermitteln. Wir bitten um etwaige Kontaktaufnahme.*

*Die vorliegende Neuauflage verfolgt ausschließlich nichtkommerzielle, wissenschaftliche und esperantologische Ziele. Ein Gewinn wird weder angestrebt noch erzielt. **Jegliche kommerzielle Nutzung mit Gewinnerzielungsabsicht durch Dritte ist untersagt.***

Atentigo pri la elektronika eldono en formato pdf

La elektronika dosiero en formato de *pdf* enhavas ligilojn (elektronikajn referencojn) al fontoj en Interneto, kiuj estas atingeblaj per simpla klako sur la blua teksto, se la komputilo estas konektata kun la komputila reto. Ekzemplo: Musklako sur la blua parto de la fontindiko „[W]“ sendas al la koncerna paĝo de la esperanta Vikipedio.

Kiel fari paperan broŝuron el tiu dokumento?

Tiu ĉi pdf-dosiero estas formatita tiel, ke oni povas facile produkti paperan broŝuron en formato A5 sur papero de formato A4 per la programo *Adobe Reader*:

1. Malfermu la pdf-dosieron per *Adobe Reader*.
2. Elektu la fal-menuon „Dosiero“, klaku la menueron „Printi“.
3. La submenua tabulo „Printi“ malfermiĝas. En la kampo „Paĝo-aranĝoj“ estas funkcio „Adaptu la paĝo-grandecon“. Malfermu la koncernan fal-menuon per klako de la nigra trianguleto.
4. Elektu la menueron „Printado de broŝuro“ kaj klaku „ek“.
5. La programo nun unue printas la unuan kaj lastan paĝon, poste la trian kaj trialastan paĝon k.t.p. (du paĝoj en formato A5 sur paperfolio en formato A4). Post la unua printofazo la printilo ekpaŭzas. Aperas fenestro kun instrukcioj, kiel turni la foliojn kaj remeti en la paper-kartoĉon por printi la dorsan flankon.
6. Post fino de la dua print-fazo, sur ĉiu A4-folio estas printitaj kvar broŝuraj paĝoj en formato A5 en la ĝusta sinsekvo. Elprenu la pretajn foliojn, faldu ilin en la mezo kaj laŭvole krampu ilin.

Enhavo

Enhavo.....	4
Antaŭparolo al la reeldono (2016)	7
Principoj de la Reeldono	9
Antaŭparolo [Velger 1999]	10
Mallongigoj	11
Difino de la nocio norma aŭ preskriba esperantologio.....	12
Mallonga enkonduko en la norman esperantologion	12
1. La konstituciaj leĝoj de la esperantistaro	12
2. Leĝa normiteco kaj evoluado de la lingvo	13
3. La esperantistaro kiel kriptoorĝanizaĵo.....	14
4. La unuopaj konstituciaj decidorganoj de la esperantistaro	15
4.1. La kongreso de la esperantistaro	16
4.2. Aŭtoritata komitato interkonsente elektita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj.....	16
4.3. Aŭtoritata centra institucio (tradicie: Akademio de Esperanto)	17
4.4. La kreinto de Esperanto	18
4.5. La unuopa esperantisto.....	19
5. Oficialaj fontoj de lingvaj normoj de Esperanto.....	19
5.1. Fundamento.....	19
5.2. Verkoj de Zamenhof	23
5.3. Resumo.....	23
6. La procedo en dubaj kazoj	24
7. Pri la rolo de la logiko	26
Apendico: Noto de K.R. Popper pri la nocio „spirito de lingvo“	28
Normesperantologiaj ekspertizetoj.....	29
I. Ĝeneralaj konsideroj.....	29
1. Ĉu en la Fundamento troviĝas eraroj?	29
2. La kompletado de la Fundamenta Gramatiko	30
3. Pri la Esperanta stilo.....	32

II. Unuopaj gramatikaj kaj stilaj demandoj	34
4. Pri la uzado de la duonvokalo „ŭ“ (kun hoketo)	34
5. Ĉu duoblaj konsonantoj interne de radiko estas kontraŭ- fundamentaj?	34
6. Pri la prononco de Esperanto.....	35
7. Pri la uzado de la artikolo	36
8. Pri la uzado de la perfektaj kaj imperfektaj participoj	36
Resumo:	40
9. Pri vortkunmetado	40
10. Pri la senco de verbaj finaĵoj, aŭ: Dumnokte la rektoro ne rektoras	43
11. Pri la esperantigo de propraj nomoj.....	45
12. La kontraŭfundamenteco de „aliu“, „alies“, „aliam“ k.t.p.	46
13. La kontraŭfundamenteco de „far“ kaj analogaj nudaj radikoj ...	47
14. Dank’ al Dio	47
III. Leksikologio	48
15. Pri „ĝi“	48
16. Pri la senco de „-iĝ-“	49
17. Unu.....	49
18. Miliardo, biliono	50
IV. Lingvaj institucioj.....	50
19. Oficialaj „Aldonoj al la Fundamento“	50
20. Ĉu la Akademio de Esperanto estas „centra“?	53
Diskutpropono pri internaciaj vortoj: Kiel apliki la 15-an regulon?	55
Kritikaj rimarkoj pri kelkaj aktualaj variantoj de Esperanto	58
1. Enkonduko	58
2. La „logika“ varianto de Esperanto („Analiza Skolo“)	58
2.1. Laŭda enkonduko.....	58
2.2. La principoj de la Esperanto-varianto de la „Analiza Skolo“ ...	59
2.3. Pliaj kritikaj rimarkoj.....	61
2.4. Resumo	63

3. La „spirita“ varianto de Esperanto (G.F. Makkink).....	63
3.1. La principoj de la Makkinka Esperanto	63
3.2. Unuopaj pliaj kritikaj rimarkoj	65
3.3. Resumo.....	66
Literaturo	67
Indekso de cititaj normtekstoj	69
Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto (1905).....	71
Antaŭparolo	71
[Defio: Gardi la unuecon]	71
[De silenta al eksplicita komuna interkonsento]	71
[„Oficiala“ (deviga) kontraŭ „privata“ (nur rekomendita)]	72
[Interpretado per kunteksta komparo].....	72
[Fundamento kiel gvida kontrol-dokumentoj]	73
[Evoluipovo malgraŭ netuŝebleco]	73
[„Novaj vortoj“]	74
[„Formoj novaj“]	74
[Monopolo por plivastigo de la Fundamento - efektiva neceseco]...	74
[Resumo]	74
[La „ideoj“ de la Antaŭparolo; Propono al UK 1]	75
Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto.....	76
La verko.....	78
La aŭtoro.....	78
La reeldonanto.....	78

Antaŭparolo al la reeldono (2016)

Komence de la 1990-aj jaroj la germana psikologo kaj juristo *Helmut Welger* (esperantigite Helmuto Velger, 1946-2008¹) estis la unua, kiu atentigis pri la okulfrape multaj juraj nocioj kaj referencoj al jura pensado en la Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto. Liaj observoj kaj konkludoj komence aperis nur en malfacile akireblaj kaj konsulteblaj artikoloj aŭ memeldonitaj broŝuroj. Konsoliditan kaj sistemigitan version Velger poste publikigis en 1999 en sia privata retejo sub la titolo „Kontribuoj al Norma Esperantologio“. Per la atributo „norma“ li substrekis la kernon de sia analizo, nome ke oni pli facile komprenas la specifan karakteron de la Fundamento kaj pro tio de Esperanto entute, aplikante prioritare jurajn, kaj do ne lingvistikajn metodojn (!). Post la frua morto de Velger pro nekuracebla malsano, lia retejo baldaŭ ne plu estis facile atingebla, sed konsultebla nur en internet-arkivo. La tiea versio de liaj „Kontribuoj“ estas la bazo de la nuna komentita republikigo de la Velgera broŝuro.

Ĝi esence konsistas el tri partoj: Prezento de la kerno de „norma esperantologio“ (ĝenerala parto pri fontoj kaj metodoj), apliko de la metodoj al kelkaj gramatikaj kaj vortaraj detal-demandoj („ekspertizeta“ parto) kaj apliko al du (intertempe nur plu historiaj) misinstruoj (nome al la t.n. *Analiza Skolo* kaj la *Metagramatiko* de G. F. *Makkink*).

Malgraŭ la malfavoraj komencaj kondiĉoj, la „(re-)malkovro“ de la centra nocio de l' „leĝo“ en la pensado de Zamenhof fare de Velger kaj liaj centraj tezoj disvastiĝis kaj estis kaj daŭre estas diskutataj dum la lastaj ĉ. 20 jaroj. La bazaj (re-)ekkonoj de Velger estis intertempe vaste konfirmitaj per multaj pliaj detalstudoj kaj diskutoj:

- la „ideoj“ de la Antaŭparolo, t.e. ĝia baza valor-sistemo kaj interpret-metodoj, estas deviga por eltrovi, kio estas „ĝusta“ kaj „bona“ Esperanto;
- samcele la normhierarkio kreita de la Bulonja Deklaracio kaj la Antaŭparolo al la Fundamento estas deviga;
- la Oficialaj Aldonoj al la Fundamento tiel same apartenas al la Fundamento, kiel la partoj el 1905, kun la konsekvenco, ke ĝia aktuala versio estas de 2007 (!), ne kiel multaj erare pensas de 1905.

¹ Vd. la artikolon en la esperant-lingva Vikipedio.

Plej multaj „ekspertizetoj“ de Velger pri lingvaj detaloj daŭre estas trafaj. Pri kelkaj tre malmultaj la ĝenerala diskuto intertempe venas al aliaj rezultoj. Koncernajn notojn kaj atentigojn ni aldonis al tiu reeldono.

Daŭre trafe ankaŭ estas la kritiko de Velger pri la (intertempe iama) t.n. Analiza Skolo kaj la Makkinka Metagramatiko. Kvankam tiuj variaĵoj (devioj) de la laŭnorma Esperanto, kiel ĝin fiksas la Bulonja Deklaracio kaj la Fundamento, apenaŭ plu ludas iun rolon inter la esperantistoj en 2016, la analizo de Velger restas daŭre leginda. Nuntempe estas (aŭ jam denove estis) aliaj „modoj“ aŭ skoloj, kiel ekz. „iltismo“, „piĉismo“ aŭ „bonlingvismo“, kiuj ĉiuj laŭ diversaj gradoj kaj en rilato al diversaj lingvaj aspektoj ignoras, forŝovas aŭ lezas principojn de „ĝusta“, „klasika“ kaj Zamenhofa Esperanto², principojn de ĉiu legeblajn kaj kontroleblajn en la nur dek unu mallongaj alineoj de la Antaŭparolo.

La interpretoj de la Fundamento fare de Velger ĝis nun ankoraŭ estas science ne rifutitaj. Tradiciaj lerniloj kaj instancoj, ekz. la Akademio de Esperanto aŭ lingvistoj-esperantologoj, grandaparte kaj daŭre simple ignoras kaj prisilentas ilin. La eltrovoj kaj metodoj de la „Norma Esperantologio“ tamen fariĝis bazo de la Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto (BK), plurvoluma verko kun ĉ. 1500 grandformataj paĝoj³, kiu multilate profundigas la tie ĉi denove prezentitan „klasikan“ verketon de *Helmut Welger*.

Berlino en Junio 2016

Bernhard Pabst

² Detale vd. en Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, en Apr. 2016 en vol. 1 (BK I), estontece pli detale en la aperonta vol. 3 (BK III).

³ Publikigita kaj senkoste elŝutebla (stato de Aprilo 2016) de

<https://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>. En la formato de BK, tiu ĉi broŝuro havas ĉ. 50 p.

Principoj de la Reeldono

La teksto estas senŝanĝe prenita el la iama retejo de Velger, kiel ĝi estas savita en la internet-arkivo, inkluzive de la elstarigoj, ekz. per grasaj literoj.⁴ Nova estas jeno:

- La h/u-substitua skribo de la malnova retejo estas anstataŭigita per la kutima diakrita alfabeto.
- Komentoj de la reeldonanto estas aldonitaj aŭ en rektaj krampoj („[...]“) aŭ en piednotoj kaj / aŭ enkondukita per „[pb]“. Piednotoj kun du numeroj estas el la originalo (ekz. ²⁴[18] - legu: la piednoto 24 de la reeldono havis la numeron 18 en la originalo), piednotoj kun nur unu numero estis enigita de la reeldonanto.
- La tabelo de mallongigoj estas kompletigita, kelkaj mallongigoj adaptitaj al la sistemo, uzata nun ĝenerale aŭ en la Berlina Komentario (ekz. PVZ anstataŭ PV por Plena Verkaro de Zamenhof).
- La listo de la konsultita literaturo estas adaptita al la formalajoj, uzataj en BK, kaj aktualigita (ekz. per indiko de pli novaj eldonoj de cititaj verkoj).
- La disigo de vortoj ĉe la dekstra paĝo-rando, ŝuldita al la nova formato.
- Ĉiuj grafikaj elementoj (ekz. kadroj anstataŭ malsamaj ekran-koloroj k.t.p.).
- La paĝo-referencoj en la tabelo de enhavo, ŝuldita al la nova formato.
- La teksto de la Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto estas aldonita.

⁴ Adreso: <http://web.archive.org/web/20080510142513/http://www.homaranismo.info>.

Antaŭparolo [Velger 1999]

Atente tralegante la verkojn de Zamenhof, oni certe rimarkas lian afinecon al la jurista pensmaniero. Kaj ne nur afinecon, sed mirigan kapablecon, kaj impresan juristan fantazion. Ekzemploj por tio estas i.a. la Projekto de Tutmonda Ligo Esperantista; la deklarioj pri homaranismo; la Bulonja Deklaracio; kaj antaŭ ĉio la Fundamento mem. Sufiĉe ofte li klarigis, ke la Fundamento por li estas leĝo.

Tio iam instigis min, serioze preni la Fundamenton kiel leĝon; kaj baldaŭ mi ekrimarkis, ke la jurista metodo kondukis min en ĉiuj gramatikaj kaj stilaj demandoj al la samaj rezultoj kiel Zamenhof-on en liaj Lingvaj Respondoj. Tio koncernas ne nur ĉiujn ordonojn, malpermesojn kaj rekomendojn, sed ankaŭ ties limigojn, kondiĉojn kaj gradojn de devigeo. Do, neniam estis komplezemo, cedemo aŭ similaj personaj ecoj, kiuj instigis Zamenhof-on al tiu aŭ alia prinorma eldiro, sed ĉiam estis aŭtentike normaj kialoj, kiuj rezultas el la sistemo de la tuta Fundamento. La „rekonstru-ebleco“ de la Lingvaj Respondoj estas forta argumento, ke Zamenhof la Fundamenton „leĝo“ ne nur nomis, sed ĝin fakte tiele traktis, interpretis kaj strikte obeis. La Lingvaj Respondoj estas verko de precizema lingvojuristo.

Jukas min, diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri personaj ecoj aŭ emoj. Virtoj de bona (lingvo-)juristo certe ne estas komplezemo aŭ cedemo, sed precizeco kaj fideleco al la leĝo. Malŝatantoj nomas ilin pedanteco kaj rigideco. Bone - virto estas virto nur en adekvata kunteksto, aliloke ĝi povas fariĝi malvirto; kaj inverse. Pudingo ne malpravigas la ŝtonajn murojn de domo, kaj inverse. Por ĝuste interpreti kaj apliki normojn, la juristaj virtoj estas bezonataj. La domo de ĉiu planlingvo en siaj esencaj partoj estas konstruita el normoj. Tra la fendoj de malpedante konstruita kaj flegata tia domo sur fleksebla fundamento fajfas la vento de nekontrolita arbitreco kaj eterna kverelado.

Bonvenon, karaj legantoj, en la rondo familia de la pedantoj, harfendemuloj kaj rigiduloj!

H. Velger,

Marburg/Lahn,

je la Zamenhoftago en la 88-a jaro de la leĝa valideco de la Fundamento.

Mallongigoj

A 2.5	Fundamento, Antaŭparolo, dua alineo, kvina frazo.
ACI	„aŭtoritata centra institucio“ en la senco de la Antaŭparolo
BD	Bulonja „Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo“ (1905)
BK	Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto
f,a,g,r,p,e	Respektive franca, angla, germana, rusa, pola kaj Esperanta parto de la koncerna referenco. Ekz.: R 11a = R 11 de la angla Gramatiko; R 11e = R 11 de la Esperanta kompara teksto de la Kvinlingva Fundamenta Gramatiko.
FdE	Fundamento de Esperanto (1905, aktuala stato de 2007)
FG	Fundamenta Gramatiko.
GrKG	Grundlagenstudien aus Kybernetik und Geisteswissenschaft (oficiala kromnomo: Internacia Revuo por Modeligo kaj Matematikizo en la Homsciencoj)
LR	Lingvaj Respondoj, konsiloj kaj opinioj pri Esperanto (sekvas la n-ro de la koncerna respondo).
OI	Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto
OV	Originala Verkaro de Zamenhof [1929].
PAG	Plena Analiza Gramatiko (Kalocsay/Waringhien).
[pb]	Rimarko aŭ komento aldonita de Bernhard Pabst
PVZ	Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof (Ludovikito).
R 11	11-a regulo de la Fundamenta Gramatiko.
UV	Universala Vortaro [1893-2007].
Vd.	Vidu.
ZPSK	Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung
§ 12,19	12-a paragrafo de la Ekzercaro, 19-a frazo.
[...]	Teksto en rektaj krampoj estas aldonita de la reldono.
[W]	Ligilo al la koncerna artikolo de la esperant-lingva Vikipedio.

Nomo de aŭtoro sekvata de jaronombro resendas al la literaturlisto.

Difino de la nocio norma aŭ preskriba esperantologio

Norma aŭ preskriba esperantologio estas la scienco pri la validaj normaj bazoj de Esperanto, pri ĝia (hierarkia) normsistemo (1. Bulonja Deklaracio, 2. Fundamento kun Oficialaj Aldonoj, 3. komuna lingvouzo, 4. Zamenhofa stilo); el tio ĝi deduktas, kio estas gramatike ĝusta kaj stile bona Esperanto. Tiucele ĝi sisteme kaj konsekvence aplikas la normsciencan metodaron, precipe la (norm-) logikon, la semantikan kaj teleologian norminterpretadojn kaj la kompletigon de normoj helpe de la formala teleologio. La formala teleologio - t.e. la formala teorio de racie celkonforma agado - estas parte ekvivalenta al la normlogiko, ĉar celoj povas esti rigardataj kiel kvazaŭ-normoj. (La normlogiko mem *ne* estas preskriba, ĉar ĝi povas nur kontroli normojn aŭ dedukti ilin el aliaj jam validaj normoj, sed ĝi ne povas mem krei normojn).

Mallonga enkonduko en la norman esperantologion

1. La konstituciaj leĝoj de la esperantistaro

Esperanto havas ne nur la apartaĵon, ke ĝi estas rezulto de lingvoplanado, sed ankaŭ, ke socia komunumo, la esperantistaro, oficiale leĝigis kelkajn konstituciajn dokumentojn, per kiuj la elementoj de la lingvo estas fiksitaj. Ĝi do estas ne nur planlingvo, sed - eĉ pli grave - ankaŭ konstitucia lingvo.

La esperantistaro, agante kiel ia leĝdonanto, oficiale akceptis du konstituciajn leĝojn: nome

- la Fundamenton, kaj
- la Deklaracion pri la Esenco de la esperantismo (mallonge: Bulonja Deklaracio).

La Bulonja Deklaracio estas ĉefe (sed ne nur) la enkonduka leĝo de la Fundamento. Ambaŭ kune konsistigas la konstitucion de Esperanto. Ili estis oficiale akceptitaj la 9-an de aŭgusto 1905.⁵

La Esperanto-parolantoj ĉiam konsciis pri la leĝeca karaktero de tiuj ĉi tekstoj. Zamenhof mem ofte nomis la Fundamenton „leĝo“ - ankaŭ en ties Antaŭparolo⁶. Do, trakti la Fundamenton kiel leĝon, tio tute konformas al

⁵ [pb]: FdE uzas majusklojn por monato-nomoj, do „Aŭgusto“, ne „aŭgusto“.

⁶ Vd. ekz.: **Fundamento A 2.2:** „Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel leĝojn por li.“

ĝia memdifino. Ne tiele trakti ĝin rekte kontraŭas la Fundamenton. - (Kompreneble ĝi ne estas ŝtata leĝo, sed ĝi similas al la internaciaj leĝoj de ludoj kiel ŝako, golfo, futbalo k.t.p. Kiu ekz. neglektas la regulojn de ŝako, tiu ne faras krimon; sed li simple ne vere ludas ŝakon.)

El tiu ĉi memdifino sekvas, ke oni devas apliki normsciencajn - pli precize: jurosciencajn - metodojn, por esplori, kion permesas kaj kion malpermesas tiuj tekstoj; nur tiel oni povas minimumigi subjektivan arbitrecon ĉe la tekstinterpretado. Certgrade tiuj metodoj ebligas ne nur interpreti normtekstojn, sed eĉ racie gvidi ties kompletigon. Oni konsciigu al si, ke **jurosciencaj metodoj ofte estas pli adekvataj ol lingvistikaj, por ekkoni, kio estas ĝusta, kio malĝusta en Esperanto.** Alie dirite, la jurosciencia metodologio estas nemalhavebla helpscienco de la interlingvistiko, de la esperantologio. La sistema aplikado de la jurosciencia metodologio estigas specialan branĉon de la esperantologio: la **norman esperantologion.**

2. Leĝa normiteco kaj evoluado de la lingvo

El la dirita evidentiĝas, ke iusence Esperanto, same kiel modernaj ŝtatoj, ne plu bazas sin sur kutimojuro, sed sur leĝojuro. Tamen eĉ iuj esperantistoj jen neglektas, jen malkonfesas tiun unikan trajton de Esperanto, kiu estas la garantio de la pludaŭro de ĝia lingvoteknologia supereco al ĉiuj naciaj lingvoj. Lingvistoj ĝenerale sekvas jenajn (super)regulojn: „Ĝenerala uzado neniam estas erara“ kaj „hodiaŭ eraro, morgaŭ regulo“. Tiuj reguloj tute konformas al la norma situacio de ordinaraj, kutimojuraj lingvoj, kiuj estas la normalaj objektoj de la lingvistiko. Sed ili **ne** konformas al la eksterordinara norma situacio de la leĝe fiksita Fundamenta Esperanto. Por la Fundamenta Esperanto la diritaj reguloj validas nur **parte**, nome tie, kie ne ekzistas Fundamenta normo; alivorte: nur **sub**, neniel super la Fundamento. Trakti la diritajn regulojn kiel superajn al la Fundamento, tio logike implicas personan (**norman**) **decidon**; nome: malagnoski la leĝan validecon, la netuŝeblecon eksplicite pretendatan de la Fundamento mem, kaj trakti ĝin nur kiel nedevidigan modelon. Tiamaniere oni anstataŭas la Fundamentan Esperanton per alia, kutimojura, lingvistike pli „normala“. Kiu vere volas fari tian decidon, tiu faru ĝin kun plena konscio, sed ne pro nekonscia kaj senkritika sekvado de lingvistikaj pensokutimoj. Li konsciu, ke li ekludis alian „lingvoludon“ ol tiun, kiun priskribas la Fundamento. - Kompreneble mi ĉi-sekve pritraktas nur la **Fundamentan** Esperanton, ne ties - el la vidpunkto de la Fundamento nelegitiman - kutimojuran varianton.

Esperanto nur kerne estas leĝe normita lingvo. Kvankam rilate ĝiajn bazajn normojn - ĉefe tiujn de la Fundamento - la lingvo estas ekster ĉia spontanea kaj „natura“ evoluo, tamen, en certaj limoj, ekzistas eblecoj de la necesaj kaj dezirindaj evoluado kaj adaptiĝado:

- La normoj estas nekompletaj, t.e. ili permesas aŭ bezonas kompletigon aŭ suplementadon (kadro- aŭ kernonormoj). Ĉe la plenigo de normaj kadroj temas nur pri nedevigaj „privataj rekomendoj“⁷.
- Multaj el la normoj ne estas striktaj reguloj, sed nur konsiloj.
- Ekzistas pluraj konstituciaj decidorganoj, kiuj rajtas ŝanĝi kaj oficiale (t.e. ne nur kiel „privata rekomendo“) suplementi la fundamentajn lingvajn normojn; vd. sub punktoj 3 kaj 4.

Pro ĉio ĉi tio oni eble povus nomi Esperanton „parta planlingvo“; ne ĉio en ĝi estas planita. En la sfero de la bazaj lingvaj normoj, troviĝantaj en la Fundamento, ĝi estas planlingvo; ekster tiu sfero ĝi **ne** estas planlingvo (tamen kun kelkaj limigoj pritraktotaj). Ke en la efiko-sfero de tiuj bazaj normoj neniam povas esti allasataj spontaneaj ŝanĝoj, sed nur ŝanĝoj surbaze de decidoj de fake kaj institucie kompetentaj organoj, tio garantias, ke Esperanto malgraŭ ĉiuj ŝanĝiĝoj restas kerne planlingvo. Per la decidoj de la konstitucie rajtigitaj organoj la planlingva karaktero povas esti pliigita aŭ malpliigita.

3. La esperantistaro kiel kriptorganizaĵo

La priskribita konstitucia modelo de adaptiĝ- kaj evolukapabla (parta) planlingvo do postulas ne nur devigan lingvokodon, sed ankaŭ normojn pri institucioj, kiuj rajtas ŝanĝi kaj aldoni lingvajn normojn. Alivorte, la normoj, kiuj ebligas la funkciadon de tia lingvo, devas koncerni parte eksterlingvajn temojn, nome la institucian kadron. Fakte la konstitucio de Esperanto enhavas eksplikitajn pri-organizajn normojn.

Por multaj Esperanto-parolantoj estos tre surprize, ke jam Bulonja Deklaracio kaj Fundamento mem (ĉefe ties Antaŭparolo) enhavas tiajn normojn. Zamenhof siatempe intencis krei organizaĵon de la Esperanto-parolantoj. La normoj de la Fundamento, la Bulonja Deklaracio kaj la Projekto de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista formas interrilatantan norman komplekson, kiu klare montras tiun intencon. Fundamento kaj Bulonja Deklaracio estas tiele konstruitaj, ke ili iusence **necesigas** esperantistan organizaĵon. Tion malkaŝe montras i.a. la ne validigita § 5 de la projektita teksto de la Bulonja Deklaracio, kiu eksplicite menciis la „Centran Komitaton Esperantistan“, kies funkcio estas priskribita en la statuto-projekto. Kiel konate, la esperantistoj siatempe ne deziris esti korporacie organizitaj, kaj ili malakceptis la statuto-projekton. Sed **oficiale leĝigante** la Bulonjan Deklaracion kaj la

⁷ Pri la terminologio vd.: Bulonja Deklaracio § 4 frazoj 1-3, kaj Fundamento A 5.3.

Fundamenton, ili kontraŭvole, sed normlogike neeviteble difinis sin **leĝdonanta organizaĵo**. Certe tiu ĉi ne tute konformis al la projekto de Zamenhof; sed kiam la normoj de la Antaŭparolo kaj de la Bulonja Deklaracio ekfunkciis, montriĝis, ke eĉ sen la statuto de la Ligo ili enhavas sufiĉe da organizaĵa substanco, por memstare doni en la plej gravaj partoj funkciokapablan organizaĵan normaron al tiu organizaĵo. La organizaĵo estis kaj ĝenerale restis nerimarkita ĝis hodiaŭ pro sia neekspliciteco kaj ĉar oni ne nomis ĝin organizaĵo. Troviĝante antaŭ ĉies okuloj, ĝi tamen restadas sekreta; ĝi restadas kriptorganizaĵo. Sed ĝi funkcias. Ĉar la organizaĵo ne havas oficialan nomon, ni simple nomu ĝin **la esperantistaro**.⁸

La esperantistaro per si mem havas jenajn esencajn kaj nemalhaveblajn ecojn de organizaĵo:

- membraron, kaj
- decidorganojn.

Por ambaŭ Bulonja Deklaracio kaj Fundamento donas klarajn, kaj parte mirige detalajn, regulojn, kiujn ni ankoraŭ prilumos.

Tiu ĉi organizaĵo de la Esperanto-parolantoj ekzistas krom kaj sendepende de aliaj organizaĵoj, kiuj uzas kaj / aŭ propagandas Esperanton, ekz. UEA, SAT k.t.p. Kiam la statutoj de tiaj organizaĵoj mencias Esperanton, tiam temas nur pri internaj normoj de tiuj organizaĵoj; tiuj normoj nek estigas nek limigas la validecon de la konstitucio de Esperanto. La konstitucio de Esperanto ja ankaŭ historie antaŭiris la diritajn organizaĵojn.

Kvankam la Fundamento kaj la esperantistaro havas norme sendependan de tiuj organizaĵoj ekziston, tamen la sinligo de tiuj organizaĵoj al la Fundamento havas grandan praktikan valoron.

4. La unuopaj konstituciaj decidorganoj de la esperantistaro

La konstitucio de Esperanto establis hierarkion de decidorganoj. Al la hierarkio de la organoj respondas respektiva hierarkio de la normoj faritaj de ili; tiel ke normo farita de hierarkie pli alta organo, okaze de kontraŭdiro, ĝenerale malvalidigas normon aŭ decidon de malpli alta organo.

Jen la decidorganoj, laŭrange ordigitaj:

⁸ [pb]: BD kaj FdE nomas ĝin „la esperantistoj“.

4.1. La kongreso de la esperantistaro

§ 5 de la Bulonja Deklaracio difinas, kiu estas „esperantisto“:

Bulonja Deklaracio § 5 Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva Societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga.

La tuto de la esperantistoj, la esperantistaro, estas la suvereno de „Esperantujo“, la spirita lando de la sciantoj kaj uzantoj de la internacia lingvo.

Praktike tiu suvereno agas per kongresoj, kiuj do estas iaj konstitucionaj kaj leĝdonaj kunvenoj. Tion implicite klarigas Fundamento A 11.2, parolante pri la leĝigo de la Antaŭparolo mem:

Fundamento A 11.2 Leĝan sankcion ili^{9[3]} ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita.

Bulonja Deklaracio kaj Fundamento estas leĝoj faritaj de la kongreso.

La kongreso estas organo de la tuta esperantistaro, sed ne de iu aparta alia organizaĵo esperantista; tio sekvas el la dua frazo de la supre citita § 5 de la Bulonja Deklaracio, laŭ kiu por esperantistoj apartenado al „ia aktiva Societo esperantista“ ne estas deviga.

La kongreso povas apliki sian leĝdonan povon por la tuta esperantistaro nur tiam, kiam vere ĉiuj esperantistoj (do la suvereno) partoprenas aŭ estas reprezentataj en ĝi.

4.2. Autoritata komitato interkonsente elektita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj

La norma bazo de tio estas Fundamento A 1.2, kiu jene tekstas:

Fundamento A 1.2 Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la **registaroj** de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala **leĝo** garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj kaj disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziratajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj.

⁹ Nome la **ideoj** esprimitaj en la Antaŭparolo (ne ties **lingvo!**), vd. A 11.1.

La citita frazo de la Antaŭparolo tre precize fiksas la kondiĉojn de fondiĝo kaj la sferon de kompetenteco de tiu komitato. Mi emfazas, ke por tiu decidorgano la Fundamento **ne** estas netuŝebla! Tion pliklarigas ankaŭ la sekvanta frazo A1.3, kiu jene tekstas:

Fundamento A1.3 Sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe esti absolute senŝanĝa...

Kiuj estas la „plej ĉefaj nacioj“, kies „registaroj“^{10[4]} iam havos la rajton, elekti la aŭtoritatan komitaton? Je la tempo de Zamenhof oni havis sufiĉe klaran opinion pri tio: Temis pri la t.n. „pentarkio“, la koncerto de la kvin eŭropaj grandpotencoj post la Viena kongreso¹¹ 1815¹². Al la pentarkio apartenis: Anglujo, Aŭstrio, Francujo, Prusujo (poste Germanujo), kaj Rusujo. Iliaj lingvoj estis: la franca, la angla, la germana, kaj la rusa. **Certe ne estas hazardo, ke temas pri la unuaj kvar lingvoj de la kvinlingva Fundamenta Gramatiko.** Ŝajnas eĉ, ke ilia vicordo tie sekvas la siatempan etiketan rangordon enkadre de la pentarkio.

Hodiaŭ ni eble povas rigardi la konstantajn membrojn de la Konsilantaro pri Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj kiel la „plej ĉefajn naciojn“. Ties konstantaj membroj estas: Usono, Rusujo, Britujo, Francujo, Ĉinujo.

4.3. Aŭtoritata centra institucio (tradicie: Akademio de Esperanto)

Norma bazo: Fundamento A 7.5, A 8.1, A 9.4, A 10.4 La institucio rajtas, sub certaj kondiĉoj, oficiale enkonduki novajn vortojn kaj regulojn (vd. ankaŭ A 10.4 pli sube), tiel ke ili fariĝas **fundamentaj**:

Fundamento A 7.5 Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron **oficialan**, kiel „**Aldonon al la Fundamento**“.

A 9.4 precizigas la ecojn de la centra institucio:

¹⁰ „Registaro“ evidente en la lingvouzo de Zamenhof ampleksas ĉiujn plej altajn ŝtatajn funkciojn: la leĝdonan povon, la ekzekutivon kaj la jurisdikcion.

¹¹ [pb] Malnova demando estas, ĉu oni skribu „Viena kongreso“, kiel faras Velger tie ĉi, aŭ majuskle „Viena Kongreso“, laŭ la – miopinie preferinda – modelo de OA 9 de 2007 (ekz. „Norda Maro“, ne „Norda maro“, „Flava Rivero“, ne „Flava rivero“ k.t.p.), ĉar temas pri propra nomo, konsistanta el substantivo kaj atributo.

¹² [pb] „1815“ ne estas parto de la propra nomo „Viena Kongreso“ kaj tial bezonas rolvorteton (prepozicion); legu: „post la Viena Kongreso de 1815“.

Fundamento A 9.4 Fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro.

Principe ĉiu institucio, kiu plenumas la kondiĉojn „aŭtoritata“ (rilate la lingvon) kaj „centra“^{13[5]}, povus ludi tiun rolon. Konforme al la tradicio, la „Akademio de Esperanto“ ludas ĝin.

Gravegas, ke la „aŭtoritata centra institucio“ rajtas laŭ A 10.4 nur:

Fundamento A 10.4 ... **pligrandigi** (neniam **ŝanĝi**) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ...

Ĝi do neniam povas revoki siajn oficialajn (= jam apartenantajn al la Fundamento) decidojn, ĉar tio estus pli kaj io alia ol pligrandigo de la Fundamento. Ankaŭ pro tio la institucio devas esti ekstreme singarda rilate tiujn decidojn, kiuj pligrandigas la Fundamenton. A 9.3 tekstas:

Fundamento A 9.3 Ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazoj de efektiva neceseco.

El tiu norma frazo oni eble povus konkludi, ke facilanima decido de la institucio eĉ ne fariĝus leĝe valida.

Se la institucio dezirus, ke oni **ne plu** uzu iujn vortojn aŭ regulojn troviĝantajn en la Fundamento, ĝi povus doni nur privatan rekomendon sen leĝa sankcio.

4.4. La kreinto de Esperanto

Norma bazo estas § 4, frazo 6 de la Bulonja Deklaracio. Ĝi jene tekstas:

Bulonja Deklaracio § 4.6 Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj en Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

Per tiu normo Zamenhof ekhavis ian dumvivan rajton starigi modelojn de lingvostilo. Tiuj modeloj ŝvebas inter privateco, ĉar ili estas por neniu devigaj, kaj oficialeco, ĉar ili estas oficiale, nome per la Bulonja Deklaracio mem, rekomendataj.¹⁴ Oni taŭge povus nomi ilin „duonoficialaj“.¹⁵

¹³ Pri la signifo de „centra“ vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 21.

¹⁴ [pb]: Kaj samsence en la Antaŭparolo, A 3.4-A 3.6.

4.5. La unuopa esperantisto

La konstituciaj rajtoj de ĉiu unuopa esperantisto baziĝas ĉefe sur § 4 frazo 5 de la Bulonja Deklaracio:

Bulonja Deklaracio § 4.5 Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo.

El tio sekvas i.a. la rajto de ĉiu unuopa esperantisto, libere proponi novajn radikojn, kondiĉe ke la esprimmaterialo de la Fundamento ne sufiĉas - do, se tiuj radikoj ne estas sinonimoj de radikoj troviĝantaj en la Universala Vortaro aŭ en unu el ĝiaj Oficialaj Aldonoj (vd. ankaŭ sub punkto 5.1.3.).

Tamen la formulo „tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta“ iel resendas al la lingvoteknologiaj principoj (vd. sub punkto 6): al tia ĝusteco apartenas konformeco al la lingvosento, do al la individua lingva normosento; kaj la normosento de kompetenta esperantisto devas esti konformigita al la principoj de Esperanto. - Krome oni priatentu § 4.6 de la Bulonja Deklaracio, kiu rekomendas la stilon de Zamenhof (kaj tio inkluzivas la radikojn, kiujn li uzis); vd. sub punkto 4.4. ĉi-supre.

5. Oficialaj fontoj de lingvaj normoj de Esperanto

5.1. Fundamento

La Fundamento estis leĝigita de la unua internacia kongreso de esperantistoj per § 4 frazo 3 de la Bulonja Deklaracio. La Deklaracio do estas la enkonduka leĝo de la Fundamento:

Bulonja Deklaracio § 4.3 La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo Esperanto estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.

5.1.1. La partoj de la Fundamento

El A 11.2 (citita sub punkto 4.1.) evidentiĝas, ke la Antaŭparolo estas leĝo kaj apartenas al la Fundamento. Tamen ĝi laŭ sia celo ne estas senpere lingvonormiga (gramatika, vortenkonduka), sed „metagramatika“ kaj insti-

¹⁵ [pb]: Kontraŭ Velger, mi malrekomendas uzi la nekularan kaj eksternorman kategorion de „duonoficiala“, ĉar ĝi ne agordas kun A 3.4-A 3.6, kiu konas nur la kontrastoparon „oficiala“ (deviga por ĉiuj) – „privata“ (rigardebla kiel modela, sed ne kiel deviga).

tucia regularo. Krome, laŭ A 11.2 kune kun A 11.1 ĝiaj „**ideoj**“ - do ne ĝia **lingvo!** - ricevis leĝan sankcion.

La Antaŭparolo rezervas la senpere lingvonormigan funkcion al la aliaj partoj de la Fundamento. Laŭ klarigo de A 2 kaj A 7.5 la lingvonormigaj partoj de la Fundamento, do la Fundamento en malpli vasta senco, estas:

1. La 16-regula **gramatiko**;
2. la „Universala Vortaro“;
3. la „**Ekzercaro**“;
4. la oficialaj „Aldonoj al la Fundamento“.

Oni tre atente legu A2:

Fundamento A 2 Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1) La 16-regula **gramatiko**; 2) la „**Universala Vortaro**“; 3) la „**Ekzercaro**“. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel **leĝojn** por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ **konscie**) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto.

La fundamenteco de la oficialaj aldonoj sekvas el A 7.5, ĉar ili tie eksplite estas nomataj „Aldonoj al la Fundamento“.

5.1.2. La samrangeco de ĉiuj partoj de la Fundamento

La diritaj kvar partoj estas **tute samrangaj**. La opinio, ke estas hierarkio inter ili, ne havas norman bazon. Fundamento A 2 tute sendistinge deklaras ilin **leĝoj**. La Ekzercaro jure ne estas nur „apliko“ de la normoj de la gramatiko; ĝia jura valideco ne dependas de la konformeco kun la Gramatiko, sed baziĝas senpere kaj egalrajte sur la Bulonja Deklaracio (§ 4 frazo 3) kune kun la difino de A 2.^{16[6]}

¹⁶ Io alia validas pri la Esperanto de la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino: Ĝia statuto agnoskas nur la Gramatikon kaj la Universalan Vortaron kiel bazan kodon de la lingvo. Ĉar tia normo ne estas akordigebla kun A 2, se ĝi ne estas nur rekomendo pri stilo, AIS per tio jure - kaj supozeble nevole - estigis, sub la influo de Ŝulco, propran planlingvon, preskaŭ-duoblaĵon de Esperanto, kies praktika lingvouzo sin tenas en la kadro de la Fundamento. Nur detala juroscienca analizo povos montri ĉiujn konsekvencojn de tiu normiga ago. Praktike la diferenco estas (ankoraŭ) tre malgranda, apenaŭrimarkebla. Rilate la apartan Esperanton de AIS la supre menciita opinio estas akceptebla.

5.1.3. Devigeco kaj licencoj

Kvankam la Ekzercaro havas la **saman rangon** kiel la Fundamenta Gramatiko kaj kvankam ĝi estas **deviga** (vd. ankaŭ A 3.4)^{17[7]}, ĝiaj reguloj havas alian reguligobjekton: Laŭ la terminologio de Zamenhof (vd. ekz. LR 84 C), kiu ne tute konformas al la kutima terminologio, la reguloj kaj modeloj de la Ekzercaro koncernas nur la „**stilon**“, ne la „gramatikon“. „Gramatiko“ en malpli vasta senco estas nur la Fundamenta Gramatiko; ĉiuj aliaj gramatikeroj estas kalkulataj al la „stilo“. Por ĝuste kompreni la rolon de la Ekzercaro, oni devas konsideri la normajn konsekvencojn de tiu aparta Zamenhofs terminologio: Deflankiĝo de la Ekzercaro estas per si mem ne gramatika eraro, sed peko kontraŭ la boneco de la stilo. Dum la gramatikaj reguloj toleras nenian escepton, stilaj reguloj kaj modeloj toleras malobeon, kondiĉe ke tion pravigas sufiĉe grava kialo. Ni povas menciigi ĉi tie la „**poezian licencon**“, (vd. LR 84 C). Ankaŭ konsideroj pri lingvoteknologia racieco (ĝuste tio, kion Zamenhof ne tute trafe emis nomi „logiko“) - povas pravigi malobeon de stilaj reguloj kaj modeloj. Temas pri esenca apartaĵo de planlingvo, pri aparta planlingvoteknologia licenco, kiun ni povas nomi „**racia licenco**“.

Krome dirite, laŭ la menciita terminologio PAG kaj aliaj verkoj pri gramatiko grandparte koncernas nur la stilon, ne la gramatikon. La licencoj, validantaj jam rilate la Ekzercaron, des pli validas rilate PAG-on kaj similajn verkojn.

Oni povas diri, ke la lingvoteknologiaj gvidprincipoj (vd. sub punkto 6), efikantaj ne nur kiel lingvokreaĵoj, sed certagrade ankaŭ kiel lingvouzaj, stilaj gvidprincipoj, konsistigas la „**spiriton**“ de Esperanto. Kelkaj el ili estas eksplacite menciitaj en la Ekzercaro mem: klareco kaj bonsoneco (vd. Ekzercaro § 27). § 4 frazo 6 de la Bulonja Deklaracio evidentigas la interligon inter stilo kaj „spirito“; vd. la citaĵon sub punkto 4.4. Vd. ankaŭ la apendicon. Kvankam la stilo de la Ekzercaro laŭdifine estas bona, deflankiĝo de tiu stilo surbaze de la racia licenco estas pli bona ĉar - **kondiĉe ke la deflankiĝonto prave apogas sin sur la licencon** - la licencita stilo estas pli proksima al la „spirito“ de Esperanto.

Eble la poezia kaj racia licencoj kondukas al la ne tute malĝusta, sed iomete relativiginda opinio, ke rilate al la stilo lastinstance pli gravas, pli devigas la „spirito“ ol la unuopaj reguloj kaj modeloj, kiuj do iusence estas

¹⁷ **Fundamento A 3.4:** „Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidos alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj.“

nur leĝaj konsiloj (vd. LR 84 C): Tamen oni ja neniam facilanime neglektu tiujn regulojn kaj modelojn de la Ekzercaro. Aparta detala studo estas dezirinda, kiu klarigas la limon inter akceptebla valida kaj neakceptebla nevalida aplikadoj de la racia licenco.

La devigececo de la radikoj de la Universala Vortaro kaj de ĝiaj oficialaj Aldonoj signifas, ke privataj sinonimaj radikoj estas malpermesataj. Radikoj internaciaj laŭ la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko ne estas privataj, do ĉiukaze permesataj.¹⁸ La malpermeso de sinonimoj koncernas nur la simplajn vortojn (radikojn), ne la kunmetitajn vortojn: Do „liva“ anstataŭ „mal'dekstra“ eblas (kvankam pro unueca lingvouzo ĝi ne estas rekomendinda), dum „navo“ anstataŭ „ŝipo“ ne eblas.^{19[8]}

5.1.4. Normkolizioj

Ja povas ekzisti kolizioj inter la normoj de la Fundamento (fakte estas sufiĉe malmultaj). Sed juroscience tio ne estas granda problemo: Eventualaj kolizioj inter la partoj de la Fundamento devas esti solvataj unuavice laŭ la eksplicitaj kaj implicitaj kolizisolvaj normoj de la Fundamento mem; kiam tiuj ne sufiĉas, oni apliku la ĝeneralajn jurosciencajn principojn, kiuj garantias senkontraŭdiran interpreton de normtekstoj:

- Laŭvola uzado de paralelaj formoj enkondukitaj laŭ Fundamento A 8; ĉe tio la uzado de la nova formo estas rekomendata, sed ne deviga. Okaze de kontraŭdiro permesa regulo ne forigus, sed praktike senefikigus samkoncernan malpermesan regulon. Vd. A 8:

Fundamento A 8 Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo de nia lingvo estas **tro neoportuna**, ĝi ne devos **forigi** aŭ **ŝanĝi** la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon **novan**, kiun ĝi rekomendos uzadi **paralele** kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos **arĥaismo**, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la **fundamento**, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de

¹⁸ [pb]: R 15 uzas la esprimon „vortoj fremdaj“; ĝi estas preferinda al la sinonimo „radikoj internaciaj“, kiun Velger proponas tie ĉi. — „ĉiukaze“: legu: ĉiuokaze“. — La kerna aserto „vortoj fremdaj ne estas privataj, do permesataj“ estas malklara kaj pli detala analizo dezirinda. R 15 preskribas, ke vortoj fremdaj „estas uzataj“, t.e. uzeblaj. Ne estas evidente, kial Velger en la kunteksto de R 15 referencas al la kategorio de „privata“ (kontraste al „oficiala“).

^{19[8]} Vd.: LR 54.

Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj.

Vd. ankaŭ A 10.4 (jam citita sub punkto 4.3.).

- „Lex specialis derogat legi generali“, t.e. pli speciala normo (escepto-regulo), kaze de kolizio, sur sia tereno malvalidigas ĝeneralan normon (regulon, principon); sed oni tre strikte interpretu la malvalidigon.
- La reguloj kaj modeloj de la Ekzercaro iusence estas nur leĝaj konsiloj pri „stilo“ (vd. ekz. LR 84 C). Leĝa konsilo logike implicas leĝan **permeson**. Tial, se modelo aŭ regulo de la Ekzercaro kolizias kun la Fundamenta Gramatiko, tiam temas pri escepta **gramatika** permeso, do pri „lex specialis“ (vd. ĉi-supre). Ĉe modelo la eventualaj limoj de la permeso estas kaŝitaj; por malkaŝi ilin, oni rajtas kaj devas esplori la tutan lingvouzon de Zamenhof, ankaŭ la eksterfundamentan.
- K.t.p.

5.2. Verkoj de Zamenhof

Lingvaj modeloj de Zamenhof, kiuj ne apartenas al la lingvonormigaj partoj de la Fundamento, estas rekomendataj, sed nedevigaj. Vd. § 4 frazo 6 de la Bulonja Deklaracio kaj la suprajn konsiderojn pri la instituciaj rajtoj de Zamenhof. Tiu nedeviga, duonoficiala „Zamenhofa stilo“ povas kompletigi la regulojn de la Fundamento. (Zamenhof emas kalkuli al la gramatiko nur tion, kio troviĝas en la 16 reguloj de la Fundamenta Gramatiko; ĉion alian li emas kalkuli al la „stilo“). La dirita rekomendo validas nur „pro plena unueco de la lingvo“. Tio signifas, ke ĝi en tiaj okazoj **ne** validas, kie la ĝenerala, do jam unueca lingvouzo deflankiĝas de la eksterfundamenta stilo de Zamenhof.

Kaze de kolizio kun eksplicita aŭ implicita regulo de la Fundamento ankaŭ tio, kio troviĝas en la verkoj de Zamenhof, devas esti rigardata kiel malĝusta kaj malbona. Vd. ekz.:

Fundamento A3.4 Ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem.

5.3. Resumo

Ni resumu kelkajn aparte gravajn punktojn de la supre dirita:

1. La reguloj de la Fundamenta Gramatiko estas devigaj kaj toleras nenan escepton.

2. La reguloj kaj modeloj de la Ekzercaro havas la saman rangon kiel la reguloj de la Fundamenta Gramatiko. Tio gravas kaze de kolizioj. Ili estas devigaj; tamen ili toleras esceptojn sub du kondiĉoj:
 - la poezia licenco,
 - la **racia licenco** (= planlingvoteknologia licenco).
3. La Universala Vortaro kaj la Aldonoj al la Universala Vortaro malpermesas ĉiujn private proponitajn sinonimojn. Tio koncernas nek la radikojn internaciajn laŭ R 15 nek la kunmetitajn vortojn.
4. La stilo de Zamenhof estas ne deviga, sed oficiale rekomendata, kie ankoraŭ mankas unueco de la lingvo.

6. La procedo en dubaj kazoj

En dubaj kazoj oni sisteme kaj korekte serĉu la solvon laŭ jena maniero:

Paŝo 1:

Konsultado de la Fundamento; se necese, interpretado:

- Lingva interpretado: Eliras de la terminologio de la Fundamento kaj provas ekkoni la sencon de la normo el la lingva formo. Ĉe tio oni eliru unuavice de la speciala terminologio de Zamenhof kaj de la Fundamento, duavice de la ĝenerala lingvouzo, la ĝenerala lingvojura terminologio. La apartaĵoj de teknikaj terminoj devas esti atentataj.
- Logika interpretado: Provas eltrovi sencon kaj celon de la Fundamento, kaj el la kunteksto dedukti la sencon de la unuopa normo kaj ties specialan celon (teleologia metodo).

Se laŭmetodaj konsultado kaj interpretado ne rezultigas solvon de la problemo, tiam temas pri mankanta normo, kaj oni transiru al paŝo 2.

Paŝo 2:

Enkonduko de la mankanta normo laŭ propra bontrovo, analoge al la permeso donita de § 4 frazo 5 de la Bulonja Deklaracio:

Bulonja Deklaracio § 4.5 Ĉiun ideon, kiu ne povas esti oportune esprimita per tiu materialo, kiu troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, ĉiu esperantisto havas la rajton esprimi en tia maniero, kiun li trovas la plej ĝusta, tiel same, kiel estas farate en ĉiu alia lingvo.

Principe do eblas pluraj variantoj aŭ dialektoj de Esperanto, kiuj ĉiuj estas fundamentkonformaj.

Sed la libero de tiu „propra bontrovo“ estas limigita de certaj gravaj normoj. Esperanto estas ne nur iu lingvo, sed **ĝi havas apartan leĝe difin-**

itan celon. Oni devas deiri de tiu leĝa celo de Esperanto, eksplicite formulita en la Bulonja Deklaracio:

Bulonja Deklaracio § 1.1 La Esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu „ne entrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn“, donus al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si, kiu povus servi kiel paciga lingvo de publikaj institucioj en tiuj landoj, kie diversaj nacioj batalas inter si pri la lingvo, kaj en kiu povus esti publikigataj tiuj verkoj, kiuj havas egalan intereson por ĉiuj popoloj.

Laŭ tiu difino lingvo neŭtrale homa estas socitekologia instrumento por atingi diversajn humanismajn celojn. La normo tiurilate koncernas nur la teknologian, instrumentan celon de la lingvo mem, ne la okazan praktikan celon de la unuopa uzanto de la lingvo, ĉar laŭ § 5 de la Bulonja Deklaracio ĉiu esperantisto rajtas uzi Esperanton por kia ajn celo. La leĝaj celoj laŭ § 1 frazo 1 de la Bulonja Deklaracio estas la **oficiale devigaj partoj de la t.n. „interna ideo“**^{20[9]}. Pri ĝiaj aliaj partoj validas:

Bulonja Deklaracio § 1.2 Ĉiu alia ideo aŭ espero, kiun tiu aŭ alia esperantisto ligas kun la Esperantismo, estos lia afero pure **privata**, por kiu la Esperantismo ne respondas.

La leĝa celo de Esperanto konkretiĝas en aro da bazaj lingvotekologiaj postuloj, kiujn plenumu tia internacia lingvo, por esti kiel eble plej celtaŭga instrumento. La enkondukota normo konformu al tiuj postuloj.

Tiaj postuloj, provizore ordigitaj laŭ graveco, estas por ekzemplo:

- unueco (A 5.4, A 8.3, § 4.6 de la Bulonja Deklaracio)
- stabileco
- klareco, facila komprenebleco
- esprimada oportuneco (§ 4.5 de la Bulonja Deklaracio)
- facila lernebleco
- simpleco (malmulteco de reguloj, ŝparemo pri lingvaj rimedoj, senornateco)
- reguleco (t.n. „logikeco“, malmulteco de esceptoreguloj)
- fleksebleco

²⁰ La „interna ideo“ koncernas Esperanton ne kiel lingvistikan, sed kiel socitekologian fenomenon. Tial lingvistikaj esplormetodoj estas blindaj pri ĝi.

- viveco
- beleco
- mallongeco.

Tiuj postuloj parte koincidas, parte kontraŭdiras unuj al la aliaj. La solvo tial povas esti ĉiam nur optimuma kompromiso. **Absoluta perfekteco estas neatingebla, ja eĉ nedezirinda.** Kiam unu el du kontraŭdiraj postuloj estas perfekte plenumita, tiam suferas la kontraŭa. Ju pli grava estas iu postulo, des pli gravas ĝia relativa perfekteco. Baza mezuro de la graveco estas la grado, en kiu la koncerna eco kontribuas al la celo de la lingvo: Esti kiel eble plej taŭga internacia lingvo.

Kiam la bazaj postuloj ne tute klare sugestas ion alian, tiam oni sekvu pro la unueco de la lingvo unuavice la regantan lingvouzon, duavice la lingvouzon de Zamenhof (vd. punkton 5.2.). Komprenoble tio estas nur rekomendo.

7. Pri la rolo de la logiko

Apartan pritrakton meritas la temo „logiko“, ĉar kelkfoje ekzistas eraraj opinioj, kion logiko kapablas kaj kion ne.

Por veni al konkludoj, oni bezonas premisojn. Se la konkludo estu normo (regulo), tiam almenaŭ unu el la premisoj jam devas esti normo (regulo). Sole el faktoj oni ne povas dedukti normojn. (Ni ĉi tie parolas pri sociaj normoj, ne pri la t.n. „naturoleĝoj“, kiuj nur metafore povas esti nomataj „leĝoj“.) La Fundamento estas por ni Esperanto-parolantoj la „libro de normaj premisoj“. La demando pri la ĝusteco de tiuj premisoj ne stariĝas, ĉar ĉe normoj ne temas pri ĝusteco aŭ malĝusteco, sed pri valideco aŭ nevalideco. Ĉiuj normoj de la Fundamento estas leĝe validaj ekde la 9-a de aŭgusto 1905, kiam la unua internacia kongreso de Esperanto-parolantoj decidis tion. Logika konkludo el tiuj premisoj ne estas kreado de novaj reguloj, sed nur la eksplikitigo de eventuale implicitaj, jam estantaj reguloj. La logiko ne povas krei ion esence novan.

Estas grave, ke oni konsciiĝu, ka la solvo de lingvaj demandoj ofte **ne** eblas per logika deduktado, ĉar la Fundamento simple ne entenas la bezonatajn premisajn normojn; tiel ke oni devas racie inventi - laŭ la supre priskribita paŝo 2 - novajn (ĝenerale neoficialajn) regulojn. Bedaŭrinde interpretantoj de la Fundamento ofte ne sufiĉe zorge konsciiĝas al si, kio fakte troviĝas en la Fundamento, kaj pri kio ĝi silentas. Ili projekcias siajn proprajn ideojn, pensokutimojn, subkomprenaĵojn, „memkompreneblaĵojn“ en la Fundamenton, kaj poste „logike“ eltiras ĉion ĉi tion el la teksto - prestidigitista artifiko, kiu ofte restas nerimarkata de tiuj interpretantoj.

Ĉi tie ni diru kelkajn vortojn pri la Zamenhofa uzo de la vorto „logiko“. Li ofte uzis tiun vorton, kaj la kunteksto ĝenerale montras, ke ne temas pri strikta deduktado el donitaj premisoj, sed pri io, kion oni prefere nomu „raciigo“, „koherigo“ aŭ „prudenta reguligo“. En tiu iom (tro) vasta senco, por ekzemplo, rektigita rivero estas pli „logika“ ol meandra; ŝaktabule konstruita urbo pli „logika“ ol urbo havanta kurbajn kaj kaŝitajn stratetojn. Estiĝas tre tipaj miskomprenoj kaj la konataj senĉesaj polemikaj debatoj, kiam oni tiun procedon de raciigo kaj prudenta reguligo simple identigas kun strikta logika deduktado. Sub la sugestio de la prestiĝa nocio „logiko“ iuj erare opinias, ke ili povas „logike pravi“ sian pravecon, dum fakte temas nur pri certaj konsideroj prudentaj, kiuj principe neniel povas estigi „la unusolan, tuthomaran, nerefuteblan veron“. Ne temas ĉi tie pri „la unika, universala, al ĉiuj homoj komuna logiko, kiu estas tiu de la scienco“ (Ŝulco 1985).

Mi rekomendas uzi la vorton „logiko“ nur tiam, kiam temas en strikta, teknika senco pri logiko. Ni ne sekvu la ekzemplon de Zamenhof, kiu bedaŭrinde ofte - ankaŭ en la Lingvaj Respondoj (1962) - uzis ĝin en sufiĉe vasta, nepreciza senco. Kie li skribis „logiko“, ni ĝenerale legu „racio“.

Apendico: Noto de K.R. Popper pri la nocio „spirito de lingvo“

Pripensindaj ĝuste por esperantistoj estas jenaj konsideroj de Popper:

„Eble estas prudente supozi, ke tio, kion oni kutime nomas la »spiriton de lingvo«, grandparte estas la tradicia mezuro de klareco, kiu estis enkondukita de la grandaj verkistoj en la respektivan lingvon. Pliaj tradiciaj mezuroj de lingvo, krom la klareco, estas ekz. mezuroj de simpleco, ornamado, mallongeco, k.t.p.; sed inter ili la mezuro de klareco estas la eble plej grava - kaj ĝi estas kultura heredaĵo, kiu estu zorgeme gardata. La lingvo estas unu el la plej gravaj institucioj de la socia vivo; ĝia klareco estas kondiĉo de ĝia funkciado kiel rimedo de racia komunikado.“²¹

²¹ El: K. R. Popper, Die offene Gesellschaft und ihre Feinde, 2-a volumo, München 1980, p. 389. [pb – traduko de la titolo: La Malferma Socio kaj ĝiaj Malamikoj, Munkeno 1980].

Normesperantologiaj ekspertizetoj

I. Ĝeneralaj konsideroj

1. Ĉu en la Fundamento troviĝas eraroj?

La rekte lingvonormigaj partoj de la Fundamento (Gramatiko, Ekzercaro, Universala Vortaro, Aldonoj)^{22[11]} laŭdifine enhavas neniujn erarojn koncerne Esperanton, ĉar ili mem estas la netuŝebla kriterio de lingva ĝusteco en Esperanto. Estas vero, ke Zamenhof en A 4 mencias „erarojn“. Sed oni devas precize legi la tekston, por ekkoni, ke temas pri aliaj specoj de eraroj: Zamenhof tie parolas pri preseraroj kaj pri el Esperanto erare tradukitaj nacilingvaj vortoj. Memkompreneble preseraroj ne povas esti netuŝeblaj, ĉar ĉe ili ja ne temas pri la vera teksto de la Fundamento; kaj por eraraj, nelertaj aŭ nebonaj nacilingvaj esprimoj ekzistas eksterfundamentaj kriterioj de ĝusteco kaj erareco, ĉar la Fundamento ja nenion povas preskribi al la lingvoj angla, franca, germana, rusa kaj pola. Nur koncerne Esperanton la Fundamento estas senerara.

Atente legu la norman tekston:

Fundamento A 4 Havante la karakteron de **fundamento**, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti **netuŝeblaj**. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorekte tiujn samajn **erarojn**, kiuj sin trovis en la unua eldono de la „Universala Vortaro“. Mi permesis al mi korekti nur la **preserarojn**; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte **tradukita**, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus **ŝanĝo**, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata. **La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj**. La **erareco** en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la **ŝanĝado** de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterdordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos

²² Vd. la punkton 5.1.1. en „Mallonga enkonduko...“.

trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon.

2. La kompleteco de la Fundamenta Gramatiko

La Fundamenta Gramatiko celas **komplete** listigi la listigitajn elementojn, i.a. la literojn, la morfologion, la personajn pronomojn kaj la nedeklinacieblajn numeralajn radikojn de Esperanto; nur aliaj partoj de la Fundamento, sed ne privataj proponoj povas aldoni ion al tio. **Neniel** la dirita implicas, ke la Fundamenta Gramatiko reguligas ĉiujn detalojn de la ĝusta aplikado.

Tiun interpreton apogas i.a. jenaj konsideroj:

1. Pro la lingvoteknologiaj postuloj^{23[12]} pri facileco kaj klareco, kiuj koncernas ne nur la strukturon de la lingvo mem, sed ankaŭ ties prezenton, la plej bazaj reguloj de la lingvo laŭeble ne estu diversloke dissemitaj, sed kolektitaj en unu sama loko.

2. Komence - por ekzemplo en la Fundamenta Krestomatio, kiu ne apartenas al la Fundamento - Zamenhof nomis la 16-regulan gramatikon „plena“. Tio estas forta indico por lia intenco pri kompleteco en la dirita limigita senco. Tamen li poste forlasis la epiteton „plena“ - supozeble, ĉar ĝi sugestias, ke la gramatiko reguligas entute ĉiajn gramatikajn detalojn de la lingvo; kaj tia ja ne estas la afero.

3. Tute evidenta estas la jura situacio koncerne la literojn: Eĉ kvankam la Fundamenta Gramatiko ne eksplicite diras tion, la alfabeto de Esperanto konsistas el la 28 listigitaj literoj, kaj ne pli. La tuta literaturo de Esperanto konfirmas tion ĉi; vd. ankaŭ LR 62.

4. La 4-a regulo de la Fundamenta Gramatiko en la germana teksto komenciĝas per jenaj nemiskompreneblaj vortoj:

Fundamento R 4g Die Grundzahlwörter (undeklinierbar) sind folgende...

La difinita artikolo „die“ klarigas, ke sekvas ĉiuj elementoj de la klaso de la nedeklinacieblaj bazaj numeraloj. Same kiel alikoke, oni devas interpreti „Grundzahlwörter“ (= „bazaj numeralaj vortoj“) kiel „bazaj numeralaj **radikoj**“, ĉar la regulo evidente ne celas komplete listigi la **kunmetitajn** numeralajn vortojn. Nur la Akademio rajtas enkonduki pliajn nedeklinacieblajn numeralajn radikojn; ĝi faris tion ĉe „nul“ (8-a Oficiala Aldono).

²³ Vd.: „Mallonga enkonduko...“, punkto 6 (paŝo 2).

5. La 5-a regulo de la Fundamenta Gramatiko en la franca, angla kaj germana partoj komenciĝas per jenaj vortoj:

Fundamento R 5f Les **pronoms** personnels sont: ...

Fundamento R 5a The personal pronouns are: ...

Fundamento R 5g Die persönlichen **Fürwörter** sind: ...

La difinitaj artikoloj „les“, „the“, kaj „die“ ĉi tie eĉ eksplicite konfirmas, ke sekvas ĉiuj elementoj de la klaso de la personaj pronomoj. Tamen aldoniĝas al ĝi la pronomo „ci“, ĉar tiu ĉi troviĝas en la Ekzercaro (§ 16.2) kaj la Universala Vortaro.

6. Signifoplena estas ankaŭ la fakto, ke Zamenhof ekde 1887 neniam uzis aliajn konjugaciajn formojn ol tiujn de la 6-a regulo. La praesperantan imperfektan formon finiĝantan per „-es“ li forigis el la lingvo, klare intencante, ke ĝi tute forestu el la lingvo kaj poste ne estu denove enkondukita per privata propono.

Ĉiuj ĉi tiuj faktoj konfirmas la supozon pri la kompleteco, en la supre dirita senco, de la Fundamenta Gramatiko. Logikaj konsekvencoj de tia kompleteco estas i.a.:

1. La enkonduko de pliaj personaj pronomoj ne eblas per privata rekomendo; nur la Akademio de Esperanto rajtas enkonduki novajn personajn pronomojn per oficiala Aldono al la Fundamento^{24[13]}.

Proponoj kiel „imi“, „iŝi“, „zi“, „gi“ (sen supersigno) k.t.p. estas kontraŭfundamentaj.

Kunmetitaj personaj pronomoj kiel „liŝi“ k.t.p. principe ja eblas, sed ili ne havas la senco celatan de la proponantoj.²⁵ La celata senco estas „li aŭ ŝi“; sed laŭ la 11-a regulo, kiu validas por ĉiuj kunmetaĵoj escepte de la numeraloj, la lasta elemento ĉiam estas ĉefelemento, dum la aliaj elementoj estas flankelementoj:

Fundamento R 11e Vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj (la ĉefa vorto staras en la fino).

²⁴ Vd.: Fundamento A 7.5.

²⁵ La analizo de Velger pri „kunmetitaj personaj pronomoj kiel ‚liŝi‘ “ en tiu alineo estas *disputebla*. Velger pretervidas, ke R 11 pri „kunmetitaj vortoj“ ne estas aplikebla. Temas pri *apudmetitaj* vortoj kiel *pli-malpli* (= pli aŭ malpli), *nigra-blanka-ruĝa* (en FK 1903, la koloroj de la iama germana flago) k.t.p. Oni tial skribu „li-ŝi“ (kun streketo). Detalojn vd. en BK I.

Do la vera senco de „liŝi“ iel similas al „vira ŝi“, aŭ „vireca ŝi“. La senco estas sufiĉe malklara kaj duba. La senco „li aŭ ŝi“ estus neakordigebla kun R 11.

2. Ĉar la listo de la participoj en la 6-a regulo estas kompleta, la proponitaj kondicionalaj participoj „-unta“ kaj „-uta“ estas kontraŭregulaj.

3. Pri la Esperanta stilo

En la Zamenhofa terminologio la vorto „stilo“ havas sufiĉe vastan sencion: Al la „stilo“ apartenas ĉiuj lingvaj reguloj kaj modeloj, kiuj ne troviĝas en la Fundamenta Gramatiko. Tial la Ekzercaro estas la baza leĝo de la stilo.

Plue oni devas priatenti § 4.6 de la Bulonja Deklaracio:

Bulonja Deklaracio § 4.6 Sed pro plena unueco de la lingvo al ĉiuj esperantistoj estas rekomendate imitadi kiel eble plej multe tiun stilon, kiu troviĝas en la verkoj de la kreinto de Esperanto, kiu la plej multe laboris por kaj per Esperanto kaj la plej bone konas ĝian spiriton.

Kion diras al ni tiu normo? Ĝi mem klarigas siajn validokialojn:

- la celadon al la unueco de la lingvo,
- la fakton, ke Zamenhof plej bone konas la spiriton de la lingvo.

Nerekte tiu rekomendo do fiksas la spiriton de la lingvo kiel mezurilon de la bona stilo. Jam aliloke mi klarigis, ke tiun ĉi spiriton konsistigas la lingvoteknologiaj postuloj (i.a. unueco, klareco, simpleco, kohereco, viveco, beleco k.t.p.)^{26[14]}. Laŭ juroscienca terminologio, § 4.6 de la Bulonja Deklaracio estigas „leĝan supozon“, ke la stilo de Zamenhof bone konformas al tiuj postuloj. Tio ne malhelpas, ke jen kaj jen la supozo povas montriĝi malĝusta. Ĉar unueco estas la plej grava postulo por la funkcio-kapableco de internacia lingvo, tial la rekomendo validas nur „pro plena unueco de la lingvo“. Do, kie tiu unueco estas atingita jam alimaniere, tie la rekomendo ne validas.

Analoga **fakta**, kvankam ne leĝa supozo ekzistas rilate la stilon de la „spiritaj mastroj“ de la lingvo:

Bulonja Deklaracio § 3.2 Kiel spiritaj mastroj de tiu ĉi lingvo estos ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj en la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

²⁶ Vd.: „Mallonga enkonduko...“, punktoj 5.1.3. kaj 6.

La diferenco inter § 4.6 kaj § 3.2 de la Bulonja Deklaracio estas, ke la unua, kiu koncernas la stilon de Zamenhof, estas **regulo**, dum la dua estas nur **konstato de fakto**. Tre klare montras tion la esprimo „estos ĉiam rigardataj“. Tamen, **praktike** la diferenco estas ne nepre tre granda.

La graveco de la unuopa lingvoteknologia postulo povas variii laŭ la tekstospeco, laŭ la celo de la komunikado. Sed ĉiam oni priintentu la bazan celon de Esperanto laŭ § 1 de la Bulonja Deklaracio, nome ke ĝi funkciiu kiel lingvo neŭtrale homa kaj donu al la homoj de malsamaj nacioj la eblon kompreniĝadi inter si. Iusence la unuopaj lingvoteknologiaj postuloj estas nur konkretigoj de la baza celo. Tio limigas la variigeblecon de la graveco de lingvoteknologia postulo. Ĝenerale la mezuro de la graveco estas la grado, en kiu la postulata eco de la lingvo kontribuas al ĝia celo.

Ekz. beleco estas pli grava en poeziaj tekstoj ol en sciencaj, dum klareco estas pli grava en sciencaj tekstoj ol en poeziaj. Sed neniam tekstoj bombaste trodetalemaj aŭ manierisme komplikitaj povas esti bonstilaj en Esperanto. **Bona Esperanto estas ĉiam simpla kaj klara.**

La racia licenco^{27[15]} permesas - sub certaj kondiĉoj - malobei la regulojn kaj modelojn de la Ekzercaro (sed ne tiujn de la Fundamenta Gramatiko), des pli la regantan lingvouzon. Kie Zamenhof parolas pri „logiko“, tie ĝenerale temas pri la racia licenco. Ĝi estas preskaŭ, sed ne plene identa kun la apogado sur la spiriton de la lingvo: La nova formo devas pli bone konformi al tiu ĉi spirito. Tio signifas, ke nur zorga kaj detala konsiderado de la lingvoteknologiaj postuloj povas montri, ĉu oni rajtas apliki la licencon. Nur la postulo de unueco devas esti neglektata ĉi tie, ĉar alie la licenco estus tute ne aplikebla.

Ĉar esprimmaniero pravigita de la racia licenco estas laŭdifine pli proksima al la spirito de la lingvo, tial ĝi estas certe ne malpli bona ol tiu de la Ekzercaro, de Zamenhof aŭ de aliaj spiritaj mastroj de la lingvo. Kondiĉe ke oni prave apogis sin sur la licencon, tiam la licencita esprimmaniero estas ĝenerale **pli bona**. Tamen la stilo de la Ekzercaro laŭleĝe restas „bona“; kaj pri la stilo de Zamenhof, rekomendata laŭ § 4.6 de la Bulonja Deklaracio, plue validas la „leĝa supozo“ pri bona konformeco al la spirito de la lingvo. Do, temas ĉi tie pri „bona“ kaj „pli bona“ stilo. Kompreneble **la pli bona stilo estas preferinda!**

Tiu ĉi preferindeco de la pli bona stilo, pro respekto al la tradicia lingvouzo, ne ĉiam estas sufiĉe atentata. Zamenhof skribis: „Tamen la diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke, dum en la unua

²⁷ Vd.: „Mallonga enkonduko...“, punkto 5.1.3.

oni devas uzi **nur** tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas **malpermesata**, - en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis, kaj ke, se lia formo estas efektive bona, ĝi baldaŭ trovos multajn imitantojn kaj iom post iom elpuŝos la malpli logikan, kvankam ĝis nun pli uzatan, formon malnovan.“ Ni lernu de Zamenhof, ke la spirito de la lingvo estas pli grava ol la tradicio: Tial **ni - enkadre de la Gramatiko - kuraĝe ĉiam preferu la formon pli „logikan“, do pli konforman al la planlingvoteknologiaj postuloj.**

II. Unuopaj gramatikaj kaj stilaj demandoj

4. Pri la uzado de la duonvokalo „ŭ“ (kun hoketo)

La Fundamenta Gramatiko en la rusa kaj germana partoj klare preskribas: „uzata nur post vokaloj“:

Fundamento R 0g ... u [mit Bogen] wie das kurze „u“ in „glauben“ (wird nur nach einem Vokal gebraucht).

Pro tio la duonvokalo „ŭ“ ne povas esti uzata alimaniere ol kiel dua elemento de diftongo²⁸; bedaŭrinde! Laŭ la lingvoteknologiaj gvidprincipoj^{29[16]} ekz. vortkomenca „ŭ“ estus akceptebla. Sed permesi tion povus nur la Akademio de Esperanto, per oficiala „Aldono al la Fundamento“. La racia licenco ne validas rilate la regulojn de la Gramatiko^{30[17]}.

5. Ĉu duoblaj konsonantoj interne de radiko estas kontraŭfundamentaj?

Laŭ Ŝulco (1987) kaj Makkink (1990) ekzistas implicita ortografia regulo en la Fundamento, kiu **strikte** malpermesas duoblajn konsonantojn en unu sama radiko. Sed la ekzistado de tia regulo estas nepruvebla. Male, jam la

²⁸ [pb]: La analizo estas nekompleta, ĉar ĝi ne diskutas „ŭo“ en FE 1 kaj OA 7: Ŭŭ - ou bref (dans l'allemand „laut“) | u as in “mount“ (used in diphtongs) | kurzes u | y (краткое) | u (krótkie) [FG 0]. — буква ŭ (которая употребляется только послѣ гласной), произносится какъ корокое u въ нѣмецкомъ словѣ kaufen или въ латинскомъ laudo. Лица, не знающія никакой другой азбуки кромѣ русской, могутъ на первыхъ порахъ произносить h какъ русское x, a ŭ какъ русское y [FG 0 rusa]. — Nomoj de la literoj: ... ŭo ... [FE 1]. — ŭo [OA 7] = nomo de la litero ŭ, dudeksesa litero de la Esperanta alfabeto. Pli detale vd. en BK I (diskuto) kaj BK II (trafoj en FdE kaj LR).

²⁹ Vd.: „Mallonga enkonduko ...“, punkto 6.

³⁰ [17] Vd.: „Mallonga enkonduko ...“, punkto 5.3., n-ro 1 kaj 2.

ekzistado de la du fundamentaj ekzemploj „Anno“ kaj „Ŝillero“³¹ pravas la neekzistadon de strikta regulo tia.

Nenio vere devigas nin supozi, ke malantaŭ la forestado de duoblaj konsonantoj ĉe radikoj enkondukitaj de Zamenhof kaŝiĝas io alia ol la aplikado, ĉe ĉiu unuopa enkonduko de vorto denove, de la ĝenerala lingvoteknologia kaj stila gvidprincipo de simpleco (rezigno pri superfluaĵoj); tial pli gravaj lingvoteknologiaj kaj stilaj gvidprincipoj - por ekzemplo: klareco kaj nemiskomprenebleco - povas okaze konduki al neglekto de la antaŭe dirita gvidprincipo^{32[18]}.

Ke ĉe la du fundamentaj ekzemploj temas pri personaj nomoj, tio estas nur hazardo sen norma signifo. Tion klarigas ankaŭ la eksterfundamenta lingvouzo de Zamenhof („nette“, „brutte“, „regatto“, „villo“ k.t.p.³³), kiun ni ĉi tie rajtas konsideri, ĉar **ekzemploj** de la Ekzercaro ja certigas nur la permeson analogiumi, sed mem ne determinas la eventualajn limigojn de plena analogiumadebleco.

6. Pri la prononco de Esperanto

La Fundamento enhavas nur malmultajn kaj evidente neprecizajn regulojn pri la prononco de Esperanto. Pli precizajn regulojn ni povas trovi en la eksterfundamentaj tekstoj de Zamenhof, kiuj - surbaze de § 4 de la Bulonja Deklaracio - estas nedevigaj, sed rekomendataj pro plena unueco de la lingvo; do tie, kie ne jam ekzistas unueca lingvouzo. LR 67 tekstas:

„La elparolado de Esperanto estas tute konforma (kompreneble krom la supersignitaj literoj) al la latina elparolado, kiu estas uzata en mia lando.“

Ni povas supozi, ke temas pri la siatempa lerneja prononco de la latina. Plue ni povas supozi, ke tiu tute egalas al la prononco de la siatempa eklezia latino en Pollando. Kaj finfine ni povas supozi, ke ties elparolado ne multe ŝanĝiĝis ĝis hodiaŭ. Do, se ni deziras precize sekvi la rekomendon de Zamenhof, ni imitu la prononcadon de la eklezia latino en Pollando. Aŭskultu la papon!³⁴

³¹ [pb]: Ŝiller'o [FG 16], Ann'o [FE 36.2].

³² [18] Vd.: „Mallonga enkonduko...“, punkto 6.

³³ [pb] brutt-e, regatt-o, vill-o en la Jürgensen-vortaro Esperanto-Germana „sub redakto de Zamenhof“ de 1904. Pri la diversaj gradoj de Zamenhofeco vd. en BK I (estontece pli detale en BK III).

³⁴ [pb]: Velger aludas al la tiama pola papo Johano Paŭlo la 2a (1920-2005), papo de 1978 ĝis lia morto. La (evidente iom ŝerca) rekomendo cetere estas maltrafa. La kutima prononcado de la latina fare de la Romaj papoj estas laŭ la itala maniero, ne laŭ la pola.

7. Pri la uzado de la artikolo

La Fundamenta Gramatiko preskribas:

Fundamento R 1e ... La uzado de la artikolo estas tia sama, kiel en la germana, franca kaj aliaj lingvoj. ...

Laŭ la kunteksto kaj konforme al la normsciencaj metodoj de interpretado, ĉe „aliaj lingvoj“ oni devas subkompreni „posedantaj difinitan artikolon“. La reguloj por la ĝusta uzado de la artikolo tial ne povas esti eltiritaj sole el la paradigmoj de la Ekzercaro, sed el la lingvouzo en la germana, franca kaj aliaj lingvoj. Se tio ne kondukas al kohera lingvouzo, tiam ni povas bedaŭri tion, sed tiu eventuala nekohereco estas neevitebla; ĝi ne povas esti malpermesata, ĉar ĝi rezultas el la validaj netuŝeblaj normoj de la Fundamento. Tio ne malhelpas, ke oni povus **rekomendi** regulojn, kiuj, se necese, iomete koherigus la uzadon de la artikolo, ne forigante gravajn partojn de ĝiaj nunaj funkcioj.

La reguloj formulitaj de G. F. Makkink (1990) ne estas akordigeblaj kun diversaj frazoj de la Ekzercaro. Tio neniel signifas, ke la Ekzercaro enhavas erarojn - ĝi mem ja estas kriterio de lingva ĝusteco (vd. la ekzertizeton n-ro 1) - sed ke liaj reguloj - kvankam ne tute malĝustaj - estas **nekompletaj**, kaj pro tio ne plene povas klarigi la uzadon de la artikolo.

La fakta uzado de la artikolo ne estas tro malkohera; sed ĝi tute **regule** kaj **kohere** inkludas plian funkcion, kiun Makkink eble ne tute komprenis kaj tial sen nepra neceseco volas „for-raciigi“: La artikolo en la zamenhofstila Esperanto same kiel en la supre diritaj lingvoj ne nur indikas difinitan ekzempleron de speco (konkretigitan individuon) sub speco aŭ kategoria nomo, sed ankaŭ (**eble nur imagatan**) **tipan aŭ reprezentan individuon**. En tiu senco oni povus anstataŭigi „la“ per „tipa“ aŭ „reprezenta“, „regula“, „normala“, „ordinara“, „averaĝa“ k.t.p. Preskaŭ ĉiuj ekzemploj, kiujn Makkink karakterizas kiel „erarajn“, apartenas al tiu kategorio de tipaj aŭ reprezentaj, ofte nur imagataj individuoj.

8. Pri la uzado de la perfektaj kaj imperfektaj participoj

La solvo de la „ata-ita-problemo“ ĉe kompleksaj verboformoj helpverbo + participo estas sufiĉe facila laŭ la **formulo de Lippmann**³⁵: „Fakte ne estas

³⁵ [pb]: Walter Lippmann (1895-1986) estis germana juristo, fariĝis membro de LK kaj ĝia Akademio en 1923 kaj samjare direktoro de ties sekcio Gramatiko. Pro sia judeco li elmigris en 1941 al Usono, sed revenis al Germanio en 1955. Li i.a. verkis multajn raportojn de AdE pri gramatikaj temoj kaj tradukis la Lingvajn Respondojn de Zamenhof al la germana.

malfacile trovi la ĝustan formon: ĝi rezultas el simpla konstato de la efektiva daŭro de ago (**-ata, se daŭranta, -ita, se finita**).“ Temas pri pludaŭro resp. finiteco de ago relative al la tempopunkto fiksita de la helpverbo. - Ni iom prilumu la detalojn.

8.1. La verbkategorioj priskribitaj en § 110 de PAG

Laŭ la Plena Analiza Gramatiko (mallongigo: PAG) oni devas distingi inter diversaj verbkategorioj por ĝuste apliki la participajn formojn. PAG distingas inter:

- verboj de daŭro kun rezulto,
- verboj de daŭro sen rezulto,
- verboj de rezulto sen daŭro.

PAG diras, ke oni ĉe verboj de daŭro sen rezulto neniam uzu la perfektajn formojn (kun -inta, -ita), sed nur la imperfektajn (kun -anta, -ata). Ĉe la verboj de rezulto sen daŭro oni uzu laŭ PAG ĉiam nur la perfektajn formojn.

La diritaj reguloj ne havas norman bazon en la Fundamento kaj nenecese katenas kaj komplikigas la ĝustan aplikon de la participaj formoj. Kritikojn pri tiuj reguloj kaj pri la verbkategorioj vi trovos en la ĉi-subaj paragrafoj.

8.2. Pri „-anta“ kaj „-ata“

La rezonado de PAG menciita sub punkto 8.1. konfuzas (sufiĉe dubajn) „filozofiajn“ aŭ „natursciencajn“ vidpunktojn kun gramatikaj. Gramatike ĉiu verbo **rajtas** havi ĉiajn participajn formojn, ankaŭ la imperfektajn, daŭro-indikajn; gramatike la daŭro povas esti infinitezima, sed ne simple nula. Tiun infiniteziman daŭron oni povus nomi „gramatika sekundo“ aŭ „gramatika tempokvantumo“. Do, „verboj sen daŭro“ gramatike ne ekzistas.

Tial oni **povas** uzi la imperfektajn participojn ankaŭ ĉe jenaj verboj: *akiri, amnestii, aresti, asekuri, asigni, atenci, atingi, decidi, difekti, difini, distingi, doni, donaci, dungi, fendi, fermi, malfermi, fini, fondi, forgesi, frakasi, fuŝi, heredi, kapti, konfuzi, konstati, konsterni, konvinki, prunti, rekompenci, renkonti, ricevi, rifuzi, rimarki, savi, signi, solvi, sterni, surprizi, trafi, trovi*, k.t.p. Tamen la Zamenhofa stilo ĉe tiuj verboj ĝenerale preferas la perfektan participon; pri la kialo legu sub punkto 8.3.

Ripetataj agoj (aŭ okazaĵoj) ofte konvencie estas rigardataj kiel nememstaraj malkontinuaĵoj de unu sama pludaŭranta ago (aŭ okazaĵo), ekzemple legado de romano, kiu kun paŭzoj povas daŭri semajnojn. Oni eĉ povas legi serion da romanoj, kaj eĉ tio povas - sed ne devas - esti unueca ago; tio tute dependas de la kunteksto, de la cirkonstancoj. Ĝenerale, unueca intenco povas kunligi malkontinuaĵojn al unueca ago, por ekzemplo la intenco sekvi regulon. Unueca kaŭzo povas kunligi okazaĵojn al unueca okazaĵo.

(Juristoj eble memoras ĉi tie la koncepton pri „daŭrigata ago“, germane „fortgesetzte Handlung“). Kulturaj konvencioj, kutimoj, rutinoj, spertoj, atendoj - do, tio, kio estas „normala“ - ludas rolon ĉe la interpretado de tio. Tial oni zorge priatentu la kuntekston, la cirkonstancojn. Fakte ĉio ĉi tio estas ffacila, ĉar ĉiu jam tre frue kaj sufcie bone lernas, kio estas „normala“.

La priskribita kunligo de malkontinuaĵoj aŭ okazaĵoj al unu sama konvencia unuaĵo, kiu faras el ili nememstarajn erojn de tiu aga aŭ okaza unuaĵo, povas gvidi al la miskompreno, ke „-ata“ esprimas ne nur **unu** daŭrantan (daŭrigatan), sed ankaŭ **plurajn** ripetatajn memstarajn agojn aŭ okazaĵojn. Sed tiu ĉi opinio havas nenian norman bazon en la Fundamento; do ĝi estas erara.

Jen ekzemplo: „La ŝlosilo estas perdata.“ Laŭ la normoj de la Fundamento tiu frazo temas pri unuopa ŝlosiloperdo, kun emfazo de la perdomomento. Pri ripetaj perdoj ĝi **ne** temas. Krome, pli zamenhofece (stile, ne pro gramatika regulo) estus diri „perdita“ (vd. sub punkto 8.3.). En „normala kunteksto“, laŭ „normalaj“ atendoj, ripetaj ŝlosiloperdoj ne aperas kiel unueca ago aŭ okazaĵo. Tial nur aldona lingva rimedo, nome la sufikso „-ad“, kunfandus la malkontinuaĵojn al unu ago.

Alia ekzemplo:

Fundamento § 25.22 Mi sciigas, ke de nun la ŝuldoj de mia filo ne estos pagataj de mi.

La frazo neante esprimas daŭran intencon, la daŭran pretecon de patro respondi pri la ŝuldoj de la filo; kaj tiu daŭra intenco farus el pluraj unuopaj pagoj nememstarajn ĉenerojn de unu sama daŭranta seria pago.

8.3. Pri „-inta“ kaj „-ita“

La preteritaj verboformoj indikas, ke la kompleta ago priparolata apartenas al la estinteco. Ĉe rezulthava ago tio signifas, ke ĝi jam plene atingis sian rezulton. Kio estas la ago, pri kies kompleteco aŭ nekompleteco temas, tion difinas ne nur la koncerna verbo, sed la tuta kunteksto. Do, en la frazo „Li eldonis sian verkon“ la ago (eldoni verkon) estas kompleta, kiam la tuta verko estas eldonita; en la frazo „Li eldonis duonon de sia verko“ la ago (eldoni duonan verkon) estas kompleta jam tiam, kiam nur duono de la verko estas eldonita.^{36[19]} - Agoj esprimitaj per „verboj de daŭro sen rezulto“ komplete apartenas al la estinteco ekde tiam, kiam ili ĉesis. Tial jam nura

³⁶ Aŭ, sprite-konfuzige, en la frazo „La verko estas nekomplete eldonita“ la ago (nekomplete eldoni verkon) jam estas kompleta, kvankam ĝia nekompleteco **en alia rilato** pluekzistas kaj estas eksplicite menciata.

ĉeso de tiaj agoj sufiĉas por permesi la uzadon de la perfektaj participoj. En la Fundamento ne ekzistas normo, kiu ĉe ili malpermesus tion.

Do oni povas tute bone uzi la perfektajn formojn ankaŭ ĉe jenaj verboj: *abomeni, admirari, adori, akompani, ami, amuzi, aspiri, atendi, atenti, balanci, bedaŭri, bezoni, deziri, (pri)dubi, envii, esperi, estimi, favori, festi, flari, fidi, frekventi, funebri, gardi, glori, gvidi, ĝui, havi, honori, ignori, interesi, karesi, kompati, koni, koncerni, konsideri, konscii, kredi, kuraci, laŭdi, logi, luli, memori, miri, moki, observi, opinii, peli, persekuti, priplori, posedi, postuli, praktiki, preferi, protekti, regi, regali, respekti, revii, rigardi, saluti, scii, sekvi, senti, serĉi, sieĝi, sopiri, speguli, suferi, suspekti, ŝanceli, ŝati, ŝuldi, taksi, teni, elteni, enteni, deteni, tenti, timi, toleri, trakti, treni, varti, vidi, viziti, voli.* Ekzistas diversaj Zamenhofaj ekzemploj por tia uzo. Vd. ekzemple LR 119 („estas amita“) kaj

Fundamento § 22.12 ... havita ...

La helpverbo „estis/estas/estos“ en kompleksaj verboformoj difinas la tempopunkton (ne la tempospacon), al kiu rilatas la participo. Ĉe „estas“ temas pri la momento de la parolo mem. Ĉe „estis“ kaj „estos“ la rilata tempopunkto ne estas precize kaj eksplicite indikata; ĝi estas ekkonebla el la kunteksto. Esprimoj kiel „lastan jaron“, „la 22-an de februaro“, „hieraŭ“ indikas la tempokadron, en kiu troviĝas la rilata tempopunkto.

Se ne apartaj cirkonstancoj sugestas ion alian, Zamenhof

- ĉe rezulthavaj verboj ĉiam, kaj
- ĉe ne rezulthavaj verboj, se ties ĉesiĝo troviĝas en la fokuso de la intereso,

emas preni la agofinon kiel helpverban tempopunkton. Tiu dislima momento ja estas elstara, iom grava tempopunkto.

Gramatike oni rajtas diri: „Georgo Vaŝington estis naskita / naskata / naskota la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.“ Fakte li naskiĝis iam dum tiu tago; kaj ekzistas tempopunktoj en tiu tago, el kies perspektivo la naskiĝo estis okazanta, kaj aliaj, kiam ĝi estis okazanta, kaj ankaŭ tiaj, kiam ĝi estis okazinta. Do kun la „ita“-formo la frazo, tiuforme troviĝanta en la Ekzercaro (§ 12.19)^{37[20]}, havas pluskvamperfektan sencon; tamen ĝi ne nepre devas signifi, ke Vaŝington naskiĝis **antaŭ** la 22-a. Konsultu historian leksikonon: Vaŝington naskiĝis ĝuste la 22-an. Zamenhof

³⁷ **Fundamento § 12.19:** „Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.“

en la citita frazo de la Fundamento, kiel kutime, prenas kiel helpverban tempopunkton tiun de la agofino. Sub tiu premiso la formo „naskita“ estas la plej klara: Se ni dirus „naskota“, tio povus signifi, ke la naskiĝo okazis nur post la 22-a; kaj se ni dirus „naskata“, tio povus signifi, ke la naskiĝo komenciĝis, sed ankoraŭ ne finiĝis je la 22-a. La plej bona stilo estas la malplej erariga.

Kiel konate, la stilo de Zamenhof ne estas la sola gramatike ebla kaj ĝusta. Sed laŭ la Bulonja Deklaracio (§ 4)^{38[21]} ĝi estas rekomendata. Do ni ĝenerale, kiel Zamenhof, preferu, laŭ la supre donitaj klarigoj, la „ita“-formon.

8.4. Finaj rimarkoj

Se oni devus esplori Esperanton nur laŭ lingvistikaj metodoj, tiam estus malfacile, eviti certajn miskomprenojn. La lingvistikaj metodoj kvazaŭ ne bone povas distingi inter la koloro, kiun la lumo de la kunteksto verŝas sur la participojn, kaj la propra, leĝe difinita koloro de la participoj. La normscienca metodo pli facile povas distingi inter ŝajno kaj esenco: Tiu distingo apenaŭ eblas nur surbaze de la lingvouzo de Zamenhof; unuavice oni devas zorge kaj sufiĉe precize konsideri la leĝajn normojn de la Fundamento. (Por la naciaj lingvoj, kiuj ne posedas konstitucion, tia distingo inter kunteksta ŝajno kaj norma esenco ne ekzistas.)

Resumo:

1. Ĉe ĉiu verbkategorio oni rajtas uzi ĉian particon. „Verboj sen daŭro“ gramatike ne ekzistas.

2. Ĉe la kompleksaj tempoj kun „estis“ kaj „estos“ Zamenhof emas rigardi rezulthavajn agojn el tempa perspektivo **tuj post** la finiĝo; tial li tiukaze preferas la „-ita“-formon. Tio ĉi ne estas gramatika regulo, sed Zamenhofa stilo, imitinda laŭ la Bulonja Deklaracio.

3. La „-ata“-formo per si mem **ne** havas la sencon de ripetado (kvankam ĝi povas ŝajni tion ĉe „daŭrigataj agoj“).

Galileece ni povas diri: Tamen Esperanto estas facila lingvo!

9. Pri vortkunmetado

Laŭ regulo 11 de la Fundamenta Gramatiko ĉia vortradiko povas esti kunmetata kun ĉia alia, sen kia ajn limigo. La finaĵoj de la flankelementoj ĉiam

³⁸ Citita en ekspertizeto n-ro 3.

povas esti forlasataj, kian ajn „gramatikan karakteron“ la radiko havas. Tiun ĉi permeson donas la 11-a regulo mem. Vd. la sufiĉe klaran anglan tekston:

Fundamento R 11a Compound words are formed by the simple junction of roots, (the principal word standing last),...

Tute ne temas ĉi tie pri la elizio laŭ la 16-a regulo, kiu permesas la elizion nur de la artikola kaj la substantiva finaĵoj. La Ekzercaro ripetas la 11-an regulon kaj aldonas stilan regulon:

Fundamento § 27.5 Vortoj kunmetitaj estas kreataj per simpla kunligado de vortoj; oni prenas ordinare la purajn radikojn, sed, se la bonsoneco aŭ la klareco postulas, oni povas ankaŭ preni la tutan vorton, t.e. la radikon kune kun ĝia gramatika finiĝo.

Principe dirate, la kunmetado de radikoj kreas subnocijon. La ĉefelemento estas la supra nocio, dum la kunmetita vorto estas subnocio, kies specifan karakteron indikas la flankelemento. Ni nomu la ĉefelementon C, kaj la flankelementon F. Jen la „senco-ekvacio“ de kunmetitaj vortoj: **F+C = subspeco de C, iele specifita per F**. Alivorte, C estas kvazaŭ familia nomo, F antaŭnomo. La dirita specifado ofte ankoraŭ ne sufiĉas por tute klarigi la sencon. La kunteksto, la tutaj kulturaj cirkonstancoj ebligas ekkoni la precizan sencon - ja estas pli-malpli granda elemento de divenado en tio -, kaj tiu ĉi senco povas fiksiĝi per lingvouza tradicio.

La senco de senfinaĵa flankelemento en tiu senco-ekvacio kvazaŭ gravitas al sia „natura“ radika karaktero. Se oni deziras uzi ĝin alikaraktere, oni por klareco aldonu la deziratan finaĵon (Ekzercaro § 27.5). Ekzemplo: Kunmetite kun verba ĉefelemento, substantiva flankelemento iel nature inklinigas, ke oni interpretu ĝin kiel agobjekton; ĉar ĉe tio ĝi povas konservi sian substantivan karakteron sen subkomprenataj helpvortoj: „voĉdoni“ = „doni voĉon“, „ordofari“ (Zamenhofa!) = „fari ordon“. „Artfari“, „artofari“ analoge gravitas al la senco „fari arton“. Se la flankelemento „art“ esprimu ne la objekton, sed la manieron de la agado, oni por klareco intermetu la adverbajn finaĵojn „-e“, kiu adekvate esprimas tiun ideon. Do: „artefari“, „artefarita“, „artefariteco“ k.t.p. (Oni konsideru, ke R 11 neniuvorte malpermesas kunmeti verbon kun rekta komplemento, aŭ kunmeti vortojn, kiuj povas esti samsignife apudmetitaj. Oni povas diri „arte farita“, sed tamen „artefarita“ estas tute regula. Krome oni konsideru, ke la tuto ofte estas pli ol la sumo de siaj partoj; la kunmetaĵo povas ekhavi sencnuancon, kiu mankas al la apudmetaĵo.)

Kiam oni por belsoneco intermetas finaĵon, tiam eĉ sence adekvata finaĵo povas alporti la eblecon de miskomprenoj. En tia kazo oni laŭeble uzu alian akcepteblan finaĵon. Ofte verbaj flankelementoj povas esti erarigaj, se oni

intermetas la laŭkaraktere ĝustan finaĵon „-i“; por eviti miskomprenojn, oni ĝenerale povas same bone uzi la finaĵon „-o“. Ekzemplo: La frazoj „mi vidas skribitablon“ aŭ „mi vidas skribitablan ilaron“ estas erarigaj, kvankam la kunmetoj „skribitablo“ kaj „skribitabla“ estas tute eblaj laŭ R 11. Ĉu la tablo skribis? Ĉu la ilaro? Pro la postulo de klareco ni uzu alian finaĵon. Ni diru „skribotablo“, „skribotabla“ k.t.p.; estas konsilinde, ĝenerale substantivigi verbajn flankelementojn.

Kelkfoje ekzistas inter si kontraŭdiraj miskomprenigaj faktoroj. Tiam oni klarigu al si, kiu estas la pli ofta, forta, grava faktoro, kaj evitu nur tiun. Ekz.: „Plaçovolo“, „plaçovola“ povas pensigi, ke „plaço“ estas la objekto de la volado; ke iu volas plaĉon, iu deziras esti plaĉato. Sed se li deziras mem plaĉi, se li volas esti plaĉanto, ni prefere diru „plaĉivolo“, „plaĉivola“. Analoge: „pagivola“, „helpidezira“, „vivivola“ k.s. „Evoluopovo“ povas pensigi kaj pri povo havata de evoluo, kaj pri povo kaŭzanta evoluon. Se oni volas esprimi, ke iu aŭ io povas evolui, tiam pli klara kaj bona estas la vorto „evoluiopovo“ (Zamenhofa!). La miskomprenoblecoj priskribitaj en la antaŭa alineo estas malpli oftaj, do malpli gravaj ol la ĉi tie priparolataj; tial oni neglektu ilin ĉi tie.

Aliaj reguloj (kaj limigoj) por la vortfarado ol R 11 kaj § 27.5 ne ekzistas. Ĉar klareco dependas de multaj, parte subtilaj, faktoroj, estas neeble formuli vere ĝeneralajn, senesceptajn regulojn tiukoncernajn. Tamen iuj esperantologoj provis indukti el la Zamenhofa lingvouzo aron de detalaj reguloj, la regulojn de la t.n. „vortefiko“ (vd. PAG §§ 287-311). Induktado el modeloj sufiĉas por formuli permesojn kaj konsilojn, sed ne por formuli malpermesojn: Ni ja scias, kion Zamenhof kaj aliaj bonaj verkistoj faris, sed ni ne scias, ĉu ĉion, kion ili **ne** faris, ili rigardis malpermesata. La neevitebla danĝero de tia induktado do estas la kreado de normaj fantomoj, ĉefe de fantomaj malpermesoj. (Sed eĉ se realaj, ili estus nur stilreguloj, kiujn oni rajtus neglekti, almenaŭ surbaze de la poezia kaj racia licencoj. Tio finfine kondukas nin al la sama rezulto kiel la senpera aplikado de § 27.5. Oni do povas ŝpari al si la ĉirkaŭvojon tra la, prave aŭ malprave, induktitaj reguloj.)

Krome, la t.n. vort-„analizoj“ (ekz. tiu, laŭ kiu oni enkondukas flank-elementojn nur per prepozicioj, aŭ la „ĉefelementa“ funkciado de finaĵo) fakte estas - parte komplikitaj - reguloj de subkomprenado, kiuj celas eviti koliziojn kun la jam fiksitaj vortefikaj reguloj. Tia subkomprenado ne bone taŭgas por pravigi aŭ eĉ „pruvi“ iujn regulojn, ĉar logike temas pri ia „petitio principii“, pri premisado de la pruvota.

Komprenoble multaj kunmetoj, kiuj tute konformas al R 11, sonos malagrade aŭ eĉ barbare al tiuj homoj, kiuj konformigis sian lingvosenton al la „vortefika“ regularo de PAG aŭ al la regularo de la „Analiza Skolo“. **Mi**

rekomendas, ke oni konformigu sian lingvosenton (do sian lingvan normosenton) al R 11 kaj § 27.5.

10. Pri la senco de verbaj finaĵoj, aŭ: Dumnokte la rektoro ne rektoras

En la artikolo „Denkanstößiges zum Problem der internationalen Kommunikation“ (Helmar Frank 1992, en: Kybernetische Pädagogik / Klerig-kibernetiko, vol. 6, p. 1039) sub punkto 5 troviĝas formoj kiel „la teoremo pruvitas” kaj „li rektoras“. Tiuj formoj, kvankam ne malpermesitaj, estas problemaj, ĉar la finaĵoj „-as“, „-is“ kaj „-os“ en la Fundamenta Esperanto **ne** signifas „estas“, „estis“ kaj „estos“. Neniu povas devigi vin, sekvi la gramatikajn, stilajn kaj instituciajn regulojn de la Fundamento; sed se vi ne faras tion, vi ludas alian „lingvoludon“ ol laŭfundamentan Esperanton. Ludi futbalon laŭ manpilkaj reguloj ne estas krimo, sed - manpilko.

En LR 119 Zamenhof (1962) skribis jenan ofte misinterpretatan tekston:

„La formoj ‘amatas’, ‘amitas’ ktp. anstataŭ ‘estas amata’, ‘estas amita’, per si mem ne prezentus ian rompon en nia lingvo, kaj, se la Lingva Komitato volus ilin aprobi, oni povus tre bone ilin uzi. Tamen, se la privataj aŭtoroj per sia **propra** iniciativo volus uzi tiujn formojn, mi tion ĉi ne konsilus. Privataj aŭtoroj povus enkonduki tiun ĉi novan formon nur en tia okazo, se „as“, „is“ k.t.p. signifus „estas“, „estis“; sed, kvankam pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo „esti“, tamen ĝis nun ili tiun ĉi signifon **ne** havas.“

Ke formoj kiel „amatas“, „amitas“ per si mem ne prezentus ian rompon de la lingvo, tio ja sekvas el la principo, ke ĉia vorto en nia lingvo povas esti kunmetata kun ĉia alia. Ankaŭ sufiksoj estas „vortoj“ en tiu senco. - Tamen la **signifo** de tiaj formoj estas problema, ĉar laŭ la ĝisnunaj reguloj de la lingvo „as“, „is“ k.t.p. **ne** signifas „estas“, „estis“. Krome, „as“ kaj „is“ kunportas la ideon de ia aktiveco; kaj tiu ideo estas algluita al la kontraŭa ideo de la pasivaj participoj. „Li **estas** amata“ ĉefe esprimas, el kiu tempa perspektivo estu rigardata tio, kion la participo eldiras, dum „li amatas“ emfazas, ke tiu pasiva amateco enhavas en si ion aktivan. „Li amatas“ tial signifus ne simple „li estas amata“, sed povus elvoki ion kiel „li okupiĝas pri amateco“, „li travivas/ĝuas amatecon“ aŭ eĉ „li banas sin en amateco“ k.s. Sed tiaj sencnuancoj tre malofte estas bezonataj, kaj ili estas pli teoriaj ol praktike senteblaj.

Precipe la rimarko de Zamenhof, ke „pli aŭ malpli frue la verbaj finiĝoj eble ricevos la signifon de la verbo 'esti“, kondukis multajn legantojn al la erara opinio, ke la lingvouzo mem iam povus doni tiun ĉi signifon al la

verabaj finaĵoj. Sed ĉar la participaj sufiksoj apartenas al la Fundamenta Gramatiko, tial neniel la lingvouzo, sed nur la Akademio rajtas doni novan sencon al ili. Oni priatentu, ke Zamenhof skribis LR 119 (Zamenhof 1962) en la jaro 1907, kiam li okupiĝis pri reformoj kaj neologismoj. „**Neologismoj**“ estas, laŭ la difino de Zamenhof, **radikoj sinonimaj al oficialaj radikoj**. (Do, laŭ tiu difino **ne** ĉiu nova vorto jam estas neologismo!). Oficialaj radikoj estas tiuj, kiuj troviĝas en la Universala Vortaro aŭ en unu el la Oficialaj Aldonoj al la Fundamento. Surbaze de la instituciaj reguloj - precipe A 8.1 - de la Fundamento (Zamenhof 1963) nur „aŭtoritata centra institucio“ - t.e. siatempe la Lingva Komitato, kaj nuntempe la Akademio de Esperanto - rajtas enkonduki tiajn sinonimojn. Zamenhof en sia Cirkulero pri neologismoj 1906 (PVZ 06-115) proponis al la Lingva Komitato: „Anstataŭ »esti« kaj ĉiuj ĝiaj formoj (»estas, estis, estos, estu, estanta« k.t.p.) estas uzata »i« kun ĉiuj ĝiaj formoj (»as, is, os, u, anta« k.t.p.).“ Tiu propono estis antaŭ ĉio ia „oferdono al la dio de malpaco“ (Zamenhof) en la specifa situacio antaŭ la Ido-krizo (vd. ankaŭ PVZ 07-133). La Komitato malakceptis tiun proponon; do ĝi ne fariĝis valida. Kaj ĝuste tia la norma situacio restis ĝis hodiaŭ.

El ĉio ĉi tio sekvas, ke **ĝenerale estas malkonsilinde (kvankam ne malpermesite) uzi formojn kiel „amatas“, „amitas“ k.t.p.**, kaj tio restos valida ĝis tiu tempo, kiam la Akademio estos realiginta la cititan proponon de Zamenhof. Laŭ mi, ĝi neniam faru tion. Kaj kial mi opinias ĉi tion? Plene kaj ĝisfine trapensu, kio logike okazus, se tiu propono fariĝus valida ĝenerala regulo: Ĝi enkondukus plian, ofte neoportunan sencon en ĉiujn Esperanto-verbojn kaj per tio komplete kaj sisteme rompus la ĝisnunan lingvouzon. Ekz. marteli tiam nepre signifus: esti martelo, krimi: esti krimo; koncerti: esti koncerto; ktp. Tial ni restu ĉe la nuna sistemo.

Kaj kio pri „rektori“ k.s.? Nu, laŭ la diritaj ĝisnunaj reguloj ĝi ne signifas nur „esti rektoro“, sed „agi rektore“ k.s. *Jacques Chirac*, la franca prezidento³⁹, iam ŝerce diris: „Ĉefo devas ĉefi.“ - *Chirac* volis esprimi per tio, ke ne sufiĉas nur **esti** ĉefo, sed ke necesas **agi** kiel ĉefo. Kaj la rektoro ĉiam estas rektoro, eĉ dormante li ne ĉesas **esti** rektoro, sed dormante li ne rektoras. Nur deĵorante li rektoras. Almenaŭ, se vi ludas la lingvoludon „Fundamenta Esperanto“.

³⁹ *Jacques Chirac* (nask. 1932) estis franca prezidento de 1995-2007.

11. Pri la esperantigo de propraj nomoj

Ĉu oni esperantigu proprajn nomojn? Nu, ne ekzistas **devo** fari tion; sed pro la spirito de la lingvo, nome pro la lingvoteknologiaj postuloj de kohereco, facileco kaj uzada oportuneco estas **bona stilo**, fari tion almenaŭ en la komunikado kun aliaj esperantistoj.

Kiel oni esperantigu nomojn? En la Fundamento troviĝas la familiaj nomoj „Ŝillero“ (R 16) kaj „Vaŝington“ (§ 12.19). La Antaŭparolo estas subskribita per „L. Zamenhof“. Kvankam la Antaŭparolo ne estas rekte lingvonormiga, ĝi tamen estas rekomendata al imitado laŭ § 4.6 de la Bulonja Deklaracio. En la Ekzercaro troviĝas i.a. la antaŭnomoj Aleksandro, Anno, Antono, Jozefo, Elizabeto, Henrieto. El la ĝeneralaj reguloj de la lingvo kune kun ĉi tiuj normdonaj ekzemploj sekvas:

- 1) Memkompreneble oni uzu nur la 28 literojn de la Esperanta alfabeto.
- 2) La propraj nomoj estu kiom eble **fonetike** esperantigitaj.

La origina formo de la nomo „Zamenhof“ estas „Samenhof“. La litero „s“ ne mankas en la Esperanta alfabeto; evidente nur por konservi la prononcon Zamenhof anstataŭis ĝin per „z“. La regulo pri fonetika transskribo sekvas ne nur el la dirita kaj analogaj ekzemploj („Jozefo“, „Elizabeto“), sed jam el R 9; krome ĝi apartenas al la planlingvoteknologiaj postuloj: Por la praktika taŭgeco de internacia lingvo la konservado de la origina prononco pli gravas ol tiu de la origina ortografio. Vd. ekz. en la UV la transskribon de la nacilingva „c“ al „k“, de la francaj vokaloj, k.t.p. Por eviti kolizion kun ekzistantaj elementoj de la lingvo la fonetika principo povas esti malobeata en unuopaj okazoj.

- 3) La uzado de la substantiva finaĵo estas fakultativa; ankaŭ apostrofo ne necesas.

Ne temas ĉi tie pri elizio de la substantiva finaĵo laŭ R 16. Tion montras la Ekzercara formo „Vaŝington“, kiu estas uzata **sen apostrofo** en § 12.19. Per tio § 12.19 estas „lex specialis“ al R 16; ĝi ne nur permesas skribi la esperantigitajn nomojn sen apostrofo, sed eĉ **oficialigas** tion kiel plenrajtan, aŭtentike Esperantan formon.

- 4) Ĉe antaŭnomoj oni prefere almetu la substantivan finaĵon.

Principe la 3-a regulo validas ankaŭ por antaŭnomoj. Tiun ĉi „leĝdonan intencon“ de Zamenhof klarigas i.a. Zamenhofaj ekzemploj kiel „Marta“, „Eva“ k.t.p. („a“ tiukaze estas nur pseŭdofinaĵo; subkomprenata „ino“ [„Marta ino“ k.t.p.] estus kaŝita malobeo al R 2, kiu certe ne konformas al la intencoj de Zamenhof). Tamen oni **prefere** almetu la finaĵon „o“ al antaŭnomoj (ĉe tio oni povas fortranĉi la pseŭdofinaĵon „a“ de virinaj nomoj, por

eviti hiatajn formojn kiel „Klarao“): Pli ol la familiaj nomoj, ili similas al „ordinaraj“ Esperanto-vortoj enkondukitaj laŭ R 15. Senfinaĵajn formojn oni uzu nur surbaze de sufiĉe gravaj stilaj kialoj, ekz. por eviti konfuzon kun viraj nomoj: Ekz. „Martina“, „Franciska“, „Inge“ („Ingo“ estas vira nomo) k.t.p. La lasta ekzemplo montras, ke la pseŭdofinaĵo ne nepre devas esti „a“.

12. La kontraŭfundamenteco de „aliu“, „alies“, „aliam“ k.t.p.

La korelativa serio „aliu“, „alies“, „aliam“, „aliom“, „alial“, „aliel“ kaj „alie“, proponita de G.F. Makkink (1990), estas kontraŭfundamenta:

1. La fundamenta radiko estas „ali”“ kaj ne „al”“. La Fundamento ne permesas la enkondukon de nova sinonima radiko^{40[22]}. Do la kunmetaĵoj „al-iu“, „al-ies“ k.t.p. ne eblas.

2. La karakterizaj korelativaj finaĵoj „-u“, „-es“, „-am“ k.t.p. konsistigas specialan kategorion: Ili en la Universala Vortaro ne havas sendependan ekzistadon, sed estas nedisigeble, sen streketoj, alforĝitaj al la radikoj de la „korelativa tabelo“. (Krome, § 30 de la Ekzercaro ankaŭ ne celas memstarigi la prefiksojn „k“, „t“, „ĉ“, „nen“; ĝi celas nur klarigi la konstruprincipon.)

La specialan - kaj iom duban - kazon de la du finaĵoj „a“ kaj „o“ ni ĉi tie ne bezonas priparoli.

Pro la nedisigebleco de la karakterizaj korelativaj finaĵoj ili ne disponeblas por krei analogajn formojn; praktike do la nedisigebleco signifas la malpermeson de analogiumado^{41[23]}. Sekve, ankaŭ la kunmetaĵoj „ali-u“, „ali-es“, „ali-am“, „ali-om“ k.t.p. ne eblas.

⁴⁰ Vd.: „Mallonga enkonduko ...”, punkto 5.1.3.

⁴¹ Vd. LR 105: „Ĉiuj vortoj de la »interrilata tabelo« konsistas el du partoj: a) radiko, b) karakteriza finiĝo (ekzemple ki-al, ki-o, neni-u, neni-a k.t.p. Ĉar pro diversaj kaŭzoj, pri kiuj mi ne povas nun paroli detale, la karakterizaj finiĝoj de la diritaj vortoj ne povis esti fiksitaj kiel finiĝoj *sendependaj* kaj *ĝeneralaj*, (ekzemple mi estis devigita preni la finiĝojn »e« kaj »u«, kiuj kiel sendependaj finiĝoj havis jam alian sencon), tial mi devis alkroĉi ilin *nedisigeble* al la radiko. Tiamaniere ilia uzado kiel *sendependa* (ekzemple en formoj »ali-u«, »ali-es«, »kelk-om«, k.t.p., kiuj per gramatika instinkto estis uzataj de kelkaj Esperantistoj) estas kontraŭregula.“

13. La kontraŭfundamenteco de „far“ kaj analogaj nudaj radikoj

En la Universala Vortaro la radiko „far“ finiĝas per streketo. Tio signifas, ke ĝi nepre postulas finaĵon, aŭ, rolante kiel substantivo, apostrofon. Kiel nuda radiko kun prepozicia senco ĝi estas pravigebla nek per regulo 11 (forfalo de finaĵo ene de kunmetita vorto), nek per regulo 16 (elizio de la substantiva finaĵo) de la Gramatiko. Aliaj reguloj, kiuj povus pravigi la forfalon de la finaĵo, ne ekzistas. La vorto „per“ en la Universala Vortaro ne finiĝas per streketo; do ĝi ne postulas gramatikan finaĵon. Evidente la analogio „pere de : per = fare de : far“ kontraŭas la Fundamenton. Do oni ne uzu „far“; tio ne estas privata rekomendo, sed leĝa ordono de la Fundamento.

Por pravigi „far“, oni povus provi argumenti, ke ĝi estas tute nove proponita prepozicia radiko sen streketo. Sed tiu argumento ne helpas: Oni ĉiukaze rajtus uzi la esprimon „fare de“, egale, ĉu oni derivas la vorton „fare“ de la radiko sen streketo aŭ de tiu kun streketo. Kio pri la senco? Ĝi estas tute la sama en ambaŭ kazoj. Tiel evidentiĝas, ke la enkonduko de senstreketa radiko „far“ estus nenio alia ol lerte kaŝita malobeo al la malpermeso de radikoj sinonimaj al oficialaj.

La samo validas pri „rilat“, „escept“, „dank“, „koncern“, „kaŭz“, kaj „flank“: ili estas Fundamentaj radikoj nepre postulantaj finaĵojn (aŭ almenaŭ apostrofojn laŭ la 16-a regulo). Ili do ne povas esti uzataj kiel nudaj radikoj. La enkonduko de samsignifaj senstreketaj radikoj neoficialaj estas malpermesata.

Do, nur per oficiala decido de la Akademio de Esperanto oni povus enkonduki la diritajn senfinaĵajn radikojn. Private rekomendataj radikoj, kiel dirite^{42[24]}, ne rajtas ekzisti paralele kun sinonimaj oficialaj.

14. Dank’ al Dio

Ĉe la tradicia esprimo „dank’ al Dio“ temas pri elipso. La interpretado de tiu elipsa frazo devas konformi al la gramatiko de Esperanto. Nur se ne eblas interpreto konforma al la gramatiko, ni devas rigardi ĝin kiel erara. Nu, ni jene povas kompletigi la elipson: „Dank(o) (estu dirata) al Dio.“ La vorto „danko“ staras en nominativo, same kiel en la germana lingvo: „Gott sei Dank“, aŭ „Dank (sei) Gott“. La formo „dank“ tute konformas al la 16-a regulo de la Fundamenta Gramatiko:

⁴² Vd.: „Mallonga enkonduko ...“, punkto 5.1.3.

Fundamento R16e La finaĵoj de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasataj kaj anstataŭataj de apostrofo. Ekz-e: *Ŝiller'* anstataŭ *Ŝillero*; *de l' mondo* anstataŭ *de la mondo*; *dom'* anstataŭ *domo*.

La frazo estas gramatike ĝusta. Sed neniel ni rajtas kompreni la elipson ekz. jene: „(Ni diru) dank(on) al Dio“, aŭ „dank(e) al Dio“, ĉar ni ne rajtas elizii „-on“ aŭ „-e“. Do, ne la elipsa esprimo, sed nur tiuj lastaj interpretoj estas eraraj. La esprimo „dank' al Dio“ estas ĝusta Esperanto. Pro la ebleco de kontraŭregula misinterpretado oni eble tamen preferu la formon „danke Dion“.

III. Leksikologio

15. Pri „ĝi“

La 5-a regulo de la Fundamenta Gramatiko koncerne „ĝi“ preskribas:

Fundamento R 5e ... ĝi - pri bestoj aŭ aĵoj; ...

Tio signifas:

[1] Por bestoj kaj aĵoj oni **ekskluzive** uzu la pronomon „ĝi“.

[2] Sekve, la pronomoj „li“ kaj „ŝi“ indikas la sekson **nur ĉe homoj**.

En la Ekzercaro troviĝas jena frazo:

Fundamento § 16.16 La infano ploras, ĉar ĝi volas manĝi.

El tio sekvas, ke

[3] oni ankaŭ por infanoj povas uzi la pronomon „ĝi“.

Ekzemploj de la Ekzercaro donas la permeson analogiumi, sed ili ne montras la eventualajn limigojn de tiu permeso. Tial la citita ekzemplo ankoraŭ ne sufiĉas por klarigi, ĉu ni rajtas **ĝenerale** uzi la pronomon „ĝi“, se temas pri homoj senkonsidere de la sekso, aŭ ĉu la escepta permeso validas **nur** pri infanoj. Por trovi la eventualajn limigojn, ni ĉi tie devas konsideri ankaŭ la eksterfundamentan lingvouzon de Zamenhof. LR 91 klarigas, ke

[4] oni rajtas uzi „ĝi“ ankaŭ por plenkreska homo, se ne temas pri konkreta individuo, sed abstrakte pri portanto de eco, funkcio, ofico k.t.p. ne ekskluzive vira aŭ virina, kvankam oni kutime uzas „li“ en tiuj okazoj; vd. § 11.2 kaj § 13.1.

Sendube la ĵus dirita uzado de „li“ estas patriarka restaĵo en nia lingvo. Sed anstataŭ tiuokaze tute sennecese ĉiam memori pri la sekso, pedante dirante „li aŭ ŝi“ aŭ - kontraŭregule - „liŝi“ (vd. la ekspertizeton n-ro 1), eble estus bone, se ni ekkutimiĝus uzi „ĝi“ en tiuj okazoj; sed ĉu nia engaĝiĝo

por lingvistika egaleco inter viroj kaj virinoj sufiĉas por transpaŝi la baron de kontraŭkutimeco? Eble la feminismoj pioniru.

16. Pri la senco de „-iĝ-“

Laŭ la UV „sidiĝi“ signifas „sich setzen“; vd. ankaŭ la Ekzercaron:

Fundamento § 39.13 Sidigu vin (sidiĝu), sinjoro!

Neniu povus sekvi la inviton sidiĝi, se ĝi celus **nevolan** eksidon. Tio **pruvas**, ke la senco de „-iĝ-“ ne implicas la nevolatecon. Ĉar do la sufikso „-iĝ-“ regule estas uzebla ĉe ĉia transiro en la staton esprimatan de la radiko - ĉu vola, ĉu nevola -, la ideo de volateco aŭ nevolateco, pro pure logikaj (!) kialoj, tute forestas de ĝi. **Logike** „-iĝ-“ temas nur pri transiro en la staton de la radiko kaj **prisilentas** la intencecon. Do, la formo „sidiĝi“ ne estas malĝusta, sed iom stranga, ĉar ĝi abstraktas de esenca parto de intenca ago, nome de ĝia intenceco. Nur pro tio la formo „sidigi sin“ estas preferinda kaj iusence pli „logika“, pli racia. Vd. la opinion de Zamenhof en LR 13.

17. Unu

Demando: Kiel vi solvos jenan kolizion? a) El la unua regulo de la Gramatiko: „Artikolo nedifinita ne ekzistas.“ b) Ekzercaro 11.1: „Unu vidvino havis du filinojn.“ c) Zamenhofo en la Lingvaj Respondoj (Marmande 1962, paĝo 93): „En la Lingvo Internacia oni devas obei sole nur la logikon.“

Respondo: Lingva Respondo n-ro 111, en kiu troviĝas la citita eldiro de Zamenhof, alie ol la Fundamento, ne estas konstitucia leĝo, kaj pro tio ĝi ne povas malvalidigi iujn normojn de la Fundamento. Pri la Lingvaj Respondoj validas:

Bulonja Deklaracio § 4.2 Ĉiuj opinioj kaj verkoj de la kreinto de Esperanto havas, simile al la opinioj kaj verkoj de ĉiu alia esperantisto, karakteron absolute privatan kaj por neniu devigan.

Bulonja Deklaracio § 4.3 La sola unu fojon por ĉiam deviga por ĉiuj esperantistoj fundamento de la lingvo estas la verketo „Fundamento de Esperanto“, en kiu neniu havas la rajton fari ŝanĝon.

Fundamento A 3.5 Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro „Fundamento de Esperanto“, devas esti rigardataj kiel oficialaj; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k.t.p., estas nur verkoj **privataj**, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel **modela**, sed ne kiel **deviga**.

Por la solvo de la ĉi tie pritraktata normkolizio LR 111 do estas nekon- siderenda. La normoj de la Fundamento ne devas esti tute „logikaj“.^{43[25]}

Tiu „unu“, pri kiu temas ĉi tie, ne estas identa kun la baza numeralo, sed - kaj tio estas konfuziga - ĝi estas deklinaciebla homonimo. La lingvouzo de Zamenhof montras, ke ĝi **ne** funkcias kiel nedifinita artikolo, kvankam ĝi estas parenca al tia artikolo, same kiel „certa“ kaj „iu“. La unua regulo estas tute ne tuŝita.

Se oni ne akceptas tiun argumenton, sed opinias, ke tiu „unu“ kolizias kun la unua regulo de la Gramatiko, tiam oni devas solvi tiun kolizion laŭ la ĝeneralaj jurosciencaj principoj. Tio signifas, ke temas pri **esceptoregulo**, kiu estu kiel eble plej restrikte interpretata.

Kiel ajn, rezulte ni devas akcepti la juran ekzistorajton de tiu t.n. „duon- difinita artikolo“ (vd. PAG § 85 Rim. I.). Mi dubas, ĉu la nomo „duon- difinita artikolo“ estas tre adekvata. Nomoj povas havi sugestian forton, kaj tiu ĉi nomo provokas kverelojn. Io simila eble okazus, se ni nomus „duon- difinitaj artikoloj“ vortojn kiel „iu“ aŭ „certa“.

Alia demando estas, ĉu oni rekomendu la uzadon de tiu „unu“. Mi prefere malrekomendus ĝin, ĉar ĝi konfuzigas multajn esperantistojn kaj povas esti miskomprenata kiel plensenca nedifinita artikolo. Kompreneble tiu mal- rekomendo havas tute privatan karakteron.

18. Miliardo, biliono

Laŭ la angla-germana sistemo de nombromoj „bilion“ signifas „miliono da milionoj“, laŭ la usona-franca-itala sistemo „milo da milionoj“. Kiu el la du sistemoj validas en Esperanto? Ĉar la Akademio de Esperanto jam oficialigis la radikon „miliard“, ĝi implicate oficialigis la angla- germanan **sistemon** de nombromoj: „Bilion“ do signifas „miliono da milionoj“.

IV. Lingvaj institucioj

19. Oficialaj „Aldonoj al la Fundamento“

La Fundamento distingas inter vortoj kaj reguloj oficialaj unuflanke kaj privataj aliaflanke (vd. Fundamento A 3.5, A 5.3, krome § 4 frazo 2 de la

⁴³ Pri la dubindeco de la Zamenhova uzo de la vorto „logiko“ vd.: „Mallonga enkonduko ...“, punkto 7.

Bulonja Deklaracio^{44[26]}). Nur tiuj vortoj kaj reguloj estas „oficialaj“ en tiu senco, kiuj troviĝas en la Fundamento mem. „Oficialeco“ en tiu senco do estas samsignifa kun „fundamenteco“; por ne konfuzi tiun fundamentan „oficialecon“ kun aliaj specoj de oficialeco, ni uzu simple la esprimon „fundamenteco“.

Al la Fundamento plenrajte apartenas ankaŭ la „Aldonoj al la Fundamento“:

Fundamento A 7.5 Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute maturaj, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron **oficialan**, kiel „**Aldonon al la Fundamento**“.

Fundamento A 10.4 Ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus **pligrandigi** (neniam **ŝanĝi!**) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj kaj reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la „Fundamento de Esperanto“, devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel **rekomendata**.

La kunteksto, ĉefe A 10.4, klare montras, ke ne nur **novaj vortoj, sed ankaŭ novaj reguloj** povas esti enkondukataj per tia „Aldono“. Novaj vortoj kaj reguloj, kiuj ne troviĝas en „Aldono al la Fundamento“, ne estas fundamentaj, eĉ se ili surbaze de iu alia, eksterfundamenta normo en iu alia rilato estas „oficialaj“ (ekz. eldiro de iu esperantista organizo aŭ instanco, oficiala laŭ ties propra statuto). Temas tie ne pri fundamenteco, sed pri alia speco de oficialeco. Laŭ la terminologio de la Fundamento ankaŭ tiaj „oficialaj“ eldiroj povas esti „privataj“, nome ne apartenantaj al la Fundamento.

Pro la normo A 7.5 (vd. supre) la aldonoj **nepre** devas porti la nomon „**Aldono al la Fundamento**“. Eksplicite A 7.5 ja temas nur pri la enkonduko de **novaj vortoj**; sed ni prenu tion kiel analogieblan ekzemplon validan ankaŭ por la aldono de **novaj reguloj**. Ne ekzistas bona norma kialo rezervi la nomon „Aldono al la Fundamento“ al la enkonduko de novaj vortoj. Ankaŭ la klareco postulas, ke oni ĉian aldono al la Fundamento eksplicite tiele nomu, ĉar alie oni ne klare kaj sendube scius, ĉu la nova regulo havu la rangon de fundamenteco; okaze de dubo ĝi ne havas tiun rangon. Ankaŭ „oficiala“ rekomendo aŭ malrekomendo de la Akademio de Esperanto estas, en la senco de la fundamenta jura terminologio, nur privata, se ĝi ne eksplicite estas enkondukita kiel „Aldono al la Fundamento“. Akcepteble estas, nomi la aldono laŭ tiu parto de la Fundamento, kiun ĝi suplementas, do „Aldono al la Fundamenta Gramatiko“, „Aldono al la

^{44[26]} Citita en ekspertizeto n-ro 16.

Ekzercaro“, „Aldono al la Universala Vortaro“. Aldonoj al la Antaŭparolo jure ne eblas, ĉar la diritaj reguloj koncernas nur la kernon de la Fundamento, la Fundamenton en malpli vasta senco, nome la Gramatikon, la Ekzercaron, kaj la Universalan Vortaron (vd. A 2)⁴⁵, sed ne la Antaŭparolon mem.

Laŭ A 10.4 (vd. supre) kaj A 8.1 la Akademio povas nur **pligrandigi**, sed neniam ŝanĝi la Fundamenton. Tio signifas, ke ĝi povas enkonduki novajn vortojn kaj regulojn, sed ne rajtas forigi iujn jam oficialajn vortojn aŭ regulojn - eĉ ne tiujn, kiujn ĝi mem enkondukis! La malnovaj oficialaj vortoj kaj reguloj ĉiukaze neabrogacieble pluekzistas paralele kun la novaj (A8.1)⁴⁶. Okaze de kontraŭdiro, permesa regulo ne forigus, sed praktike senefikigus samkoncernan malpermesan regulon.

Pro la neabrogaciebleco de oficialaj vortoj, ekz. „koncentra“ **restas** oficiala, spite al jena kontraŭkonstitucia, do nevalida normo:

Oka Oficiala Aldono al la UV, II.B/1. *La vorto koncentra perdas sian oficialecon: ĝian signifon oni jam delonge esprimas per: samcentra.*^{47[29]}

Tamen la citita frazo ne nepre estas tute sensignifa; ĝi povas esti interpretata kiel simpla malrekomendo koncerne „koncentra“ kaj rekomendo koncerne „samcentra“.

Estus bone, se ĉiuj novaj eldonoj de la Fundamento estus presataj kun ĉiuj ĝis tiam publikigitaj „Aldonoj al la Fundamento“, ĉar tiuj aldonoj estas legitimaj partoj de la Fundamento.⁴⁸ Ne koni ilin signifas ne bone koni la aktuale validan Fundamenton; kaj tio estas malobeo al jena regulo:

Fundamento A 10.2 Pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la fundamenton de nia lingvo.

Hodiaŭ tio signifas, ke ĉiu esperantisto **devas** bone koni ankaŭ la Plenan Ilustritan Vortaron, ĉar ĝi enhavas ĉiujn oficialigitajn radikojn. Tial ĝi iusence estas parto de la Fundamento.⁴⁹

⁴⁵ Citita en „Mallonga enkonduko ...“ sub punkto 5.1.1.

⁴⁶ Citita en „Mallonga enkonduko ...“ sub punkto 5.1.2.

⁴⁷ Nevalidajn normtekstojn ni citas en kursivaj literoj.

⁴⁸ [pb]: Vd. nun en BK II.

⁴⁹ [pb]: Tiu aserto ŝajnis duba (kaj ĉiukaze ne sufiĉe motivita – kio ekz. signifas „iusence“?) jam en 1999, sed en 2016 sendube ne plu estas akceptebla: PIV 1970, 2002 kaj 2005 simple ne estas sufiĉe fidindaj pri la demando de aparteno al FdE, iliaj kriterioj pri i.a. la signifoj aŭ interago-reguloj de iuj vortoj ne estas tiuj de FdE k.t.p. En 2016

20. Ĉu la Akademio de Esperanto estas „centra“?

Fundamento A 10.4 (citita en la ĉi-supra ekspertizeto) parolas pri „aŭtoritata centra institucio“, kiu rajtas oficialigi novajn vortojn kaj regulojn. Tradicie la „Akademio de Esperanto“ ludas tiun rolon, kaj tio estas legitima, kondiĉe ke la Akademio estas „aŭtoritata“ kaj „centra“. „Aŭtoritata“ ĝi ja estas⁵⁰, sed ĉu „centra“? Ni devas iomete prilumi, kion signifas en similaj kunteksto la modesta vorto „centra“ en la lingvouzo de Zamenhof.

Ni memoru, ke Zamenhof proponis la Fundamenton, la Bulonjan Deklaracion kaj la Regularon de Tutmonda Ligo Esperantista kiel tutaĵon al la unua Kongreso. Pro tio ni povas supozi, ke la lingvouzo, la nocioj uzataj en la tri tekstoj estas samsignifaj.

La malakceptita projektita § 5 de la Bulonja Deklaracio eksplicite tekstis:

Projektita Teksto de la Bulonja Deklaracio § 5 Pri ĉiuj duboj, kiuj aperas ĉe la uzado de la lingvo Esperanto, decidus ĉiam la Centra Komitato Esperantista, elektata de la esperantistoj de la tuta mondo en la internaciaj kongresoj esperantistaj.

Tiu teksto aludas la Projekton de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista. Pri la Komitato de la Lingvo, suborgano de la Centra Komitato memstare okupanta sin je la kurantaj lingvaj aferoj enkadre de eventualaj specialaj instrukcioj de la Centra Komitato, la Regularo preskribis:

Projekto de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista § 11 frazo 3 Ĉiujn membrojn por la unua jaro elektas la aŭtoro de Esperanto; en ĉiu sekvanta jaro ĉiu Komitato mem eligas 1/3 de siaj membroj (reelekteble) kaj anstataŭigas ilin per aliaj, per voĉdonado, aranĝita 2 monatojn antaŭ la Kongreso, de la Komitata prezidanto, kiu sendas al ĉiu membro la nomaron de ĉiuj personoj kiuj esprimis al li la deziron eniri en la Komitaton. La rezultato de la voĉdonado estas prezentata por aprobo al la Kongreso.

Do, kaj la Centra Komitato kaj la Komitato de la Lingvo lastinstance dependas de la volo de la Kongreso, t.e. de la esperantista popolo. La tuta kunteksto do supozigas nin, ke „centra“ por Zamenhof iel implicas „demokrata“, „reprezenta“.

ekzistas nur la (relative malfidinda) „Akademia Vortaro“ kaj la (pli fidinda) „Vortaro Oficiala“ en BK II, vd. la diskuton en ĝia enkonduko.

⁵⁰ [pb]: Pri la „aŭtoritato“ de la Akademio ekzistas fortaj duboj en 2016 (kaj ekzistis en 1999, kiam Velger verkis tiun frazon). Vd. nun en BK IV – Akademia Dokumentaro.

Plue, en letero al Sebert de la 1-a de julio 1909 Zamenhof skribis: „Laŭ mia opinio la granda eraro de la ĝisnuna Centra Oficejo konsistis en tio, ke portante nomon oficialan, ĝi en efektiveco estis institucio pure **privata**. Se vi deziras, ke la Centra Oficejo havu aŭtoritaton kaj konfidon, ĝia komitato devas nepre esti elektata de la esperantistaro mem kaj donadi kalkulajn raportojn pri sia agado al la esperantistaj grupoj aŭ iliaj delegitoj. ... Mi kredas profunde, ke la Centra Oficejo havos sukceson kaj fortikecon nur tiam, se ĝi efektive estos **centra**, t.e. elektata kaj donanta kalkulraportojn; nur tiam ĝia voĉo havos grandan valoron (ĉar ĝi estos efektiva reprezentanto de la esperantistoj)...“.⁵¹

Tiu teksto enhavas ian difinon de „centra“, nome i.a. „elektata de la esperantistaro kaj donanta kalkulraportojn“. Kvankam ni ankoraŭ ne en ĉiuj detaloj scias, kion la vorto „centra“ signifis por Zamenhof, ni povas diri: La kerno de la ĉi-kunteksta signifo estas „demokrate reprezenta“.

Ŝajnas do, ke la Akademio ne plenumas la kriterion de la Fundamento, ĉar la akademianoj nek estas rekte elektataj de la esperantistaro, nek la internaj elektoj estas almenaŭ poste aprobatataj de la kongreso; la Akademio mem elektas siajn membrojn (Art. 6 de la statuto)⁵², sen posta kongresa aprobo. Oni povas, iom pene, pravigi tion, argumentante, ke per silenta interkonsento la esperantistoj aprobis la ĝisnunajn elektojn, ĉar la esperantistoj estas konvinkitaj, ke la akademianoj mem estas la plej kompetentaj esperantistoj, kiuj plej bone scias, kiu meritas esti akademiano.

Estas facile imageble, kiajn nekontestebajn avantaĝojn kaj kiajn danĝerojn alportas tia elektosistemo, kiu faras el la Akademio ian nekontrol-eblan kardinalan kolecion. Zamenhof, kiu ne volis resti ia lingvopapo, certe preferus, ke la Akademio havu pli da demokrata legitimeco, ekz. tiel, ke la interna voĉdonado en la Akademio estas prezentata por aprobo al la kongresoj, laŭ la modelo de § 11 frazo 3 de la projektita Regularo, vd. supre.

⁵¹ [pb]: Mankas fontindiko ĉe Velger. Temas pri LR.

⁵² La Statuton validan en 1999 kaj la nunan de 2016 vd. en BK IV.2.

Diskutpropono pri internaciaj vortoj: Kiel apliki la 15-an regulon?

La 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko difinas vortojn „fremdajn“ kiel tiujn, kiujn „la plimulto de la lingvoj prenis el unu fonto“. Kiom da lingvoj estas plimulto? Neniu precize scias, kiom da lingvoj ekzistas. La nombro de la lingvoj parte dependas ankaŭ de arbitraj difinoj, ĉar ne estas klara limo inter lingvoj kaj nuraj dialektoj. Ĉiukaze ekzistas **pluraj miloj da lingvoj**. Jam en Eŭropo ekzistas ĉirkaŭ 120 diversaj lingvoj. Do, se ni tute laŭvorte prenis la regulon, ĝi estus praktike ne aplikebla. Certe Zamenhof ne volis doni neaplikeblan regulon, kaj fakte li ja iel aplikis ĝin; tial ni, konforme al la normsciencaj metodoj, devas restrikte interpreti liajn vortojn; ni devas trovi la limigojn, kiujn li subkomprenis. La t.n. „semantika interpretado“ (vd.: Mallonga enkonduko ..., punkto 6, sub paŝo 1) ĉi tie kondukas al, laŭ mi, kontentiga solvo. **Tamen bv. rigardi la ĉi-subajn konsiderojn nur kiel diskutproponon.** Por tute forigi ĉiujn dubojn pri ĉi tiuj demandoj ni verŝajne bezonus oficialan „Aldonon al la Fundamento“.

En la Unua Libro Zamenhof donis por la kreado de vortoj i.a. tri regulojn, kiuj povas helpi en ĝusta maniero restrikte interpreti la 15-an regulon. Jen mi citas ilin:

(1) „La vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo.“ „Tiamaniere ĉe korespondado kun meze-klera Eŭropano, kiu tute ne lernis la lingvon internacian, mi povas esti certa, ke li ne sole min komprenos, sed eĉ sen bezono tro multe serĉadi en la vortaro, kiun li uzos nur ĉe vortoj dubaj.“

(2) „Vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj (la tiel nomatajn „fremdajn“ kaj „teknikajn“), mi lasis tute sen ia ŝanĝo.“

(3) „El la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj.“

Krome, en § 1 de la propono pri regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj (1890) li skribis:

Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj (1890) § 1 La fina celo de la ligo estos atingita tiam, kiam por ĉiu homo estos sufiĉe, scii ekster sia propra lingvo nur la lingvon neŭtrale homan, por jam sen bezono de ia alia lingvo povi libere kompreniĝi kun la tuta civilizita mondo.

Kion tiuj ĉi reguloj instruas al ni?

- Zamenhof, sekvante la pensmanieron de la 19-a jarcento, ĉe „lingvoj“ emis subkompreni „civilizitaj“. Pri kiuj lingvoj do temas? „Civilizita“ en la tempo de Zamenhof iel inkludis „eŭropa“ aŭ „kristane-okcidenta“.

- Inter tiuj „civilizitaj lingvoj“ troviĝas elstara grupo: nome la „plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj“. Zamenhof, kvankam dirante „ĉiuj“ en (2), certe ne konsideris vere ĉiujn ĉirkaŭ 120 eŭropajn lingvojn, sed nur la ne tute malgravajn. Ni ekkomprenas, ke laŭ Zamenhof oni devas ne simple nombri, sed ankaŭ pesi la lingvojn. La vera mezurilo de la internacieco de vorto ne estas la nombro de la lingvoj, al kiuj ĝi apartenas, sed la nombro de homoj, kiuj konas la vorton. La celo ja estas, ke Esperanto konsistu el kiel eble plej vaste konataj vortoj; el vortoj, kiujn la plimulto de „meze-kleraj eŭropanoj“ jam konas. Tial internacie gravaj lingvoj, t.e. lingvoj parolataj de tre multaj homoj kaj almenaŭ regione servantaj por internacia komunikado, estas la „plej ĉefaj lingvoj“. Inter la eŭropaj lingvoj plenumas tiun kriterion: la hispana, la angla, la rusa, la portugala, la germana kaj la franca. Entute ĉirkaŭ 1320 milionoj da homoj parolas eŭropajn lingvojn kiel gepatrajn; la ĵus menciitaj lingvoj kune ampleksas jam ĉirkaŭ 80 % de la tuta parolantaro de eŭropaj lingvoj. Jen la reprezentaj, „plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj“.

Ni do trovis la bazan principon de la Zamenhofa vortkreado: Oni prenu la vortojn kiom eble el la plej ĉefaj eŭropaj lingvoj. Ju pli da tiaj lingvoj, al kiuj iu vorto apartenas, des pli preninda ĝi estas.- Kaj nun malgranda, konsekvenca paŝo kondukas nin al la regulo: **Nepre** preninda ĝi estas, kiam ĝi apartenas al **ĉiuj** aŭ almenaŭ al la **plimulto** de la plej ĉefaj eŭropaj lingvoj. Jen la regulo pri la vortoj „fremdaj“, kune kun tio, kion Zamenhof supozeble subkomprenis.

Nia interpreto estas apogata de la fakto, ke Zamenhof ne multe sciis kaj konsideris ekstereŭropajn lingvojn, ekzemple la lingvojn ĉinan, japanan, araban, hindian, k.t.p.; tamen li ne hezitis - ankaŭ ne post la leĝiĝo de la Fundamento -, nomi iun tuteŭropan vorton „fremda“ aŭ „internacia“, kvankam ĝi estas nekonata al la plejmulto de la ekstereŭropaj lingvoj.

Nun ni povas reformuli la 15-an regulon, eksplicite enmetante tion, kion Zamenhof subkomprenis: „La tiel nomataj vortoj »fremdaj“, t.e. tiuj, kiujn la plimulto de la plej ĉefaj eŭropaj lingvoj prenis el unu fonto, estas uzataj en la lingvo internacia sen ŝanĝo, ricevante nur la ortografion de tiu ĉi lingvo;...“ Kaj ni aldonu: La ĉefaj eŭropaj lingvoj estas la lingvoj hispana, angla, rusa, portugala, germana kaj franca.

Tiu ĉi formulo aspektas malplaĉe eŭrocentrisma, tamen ĝi ankoraŭ hodiaŭ estas praktike akceptebla kaj taŭga. Ja estas fakto, ke laŭ ĝi la „fremdaj“ vortoj en Esperanto estas unuavice **tuteŭropaj**, sed ne nepre jam **tutmondaj**. Sed pripensu: La eŭropaj lingvoj almenaŭ estas grava parto de

la lingva mondo. **Ne nepre ĉiu tuteŭropa vorto estas ankaŭ tutmonda; sed ĉiu tutmonda vorto verŝajne estas ankaŭ tuteŭropa.** Do, la tutmondeco de nia lingvo neniel suferas, sed gajnas ĝiaj unueco kaj stabileco, gajnas la amplekso de ĝia ĝenerale akceptata vortaro.

Krome, mi rekomendas legi la argumentojn de Zamenhof kontraŭ la riproĉo, ke Esperanto „ne estas sufiĉe internacia“; vd. LR 51. Tie li aprobe karakterizis nian vortaron ne simple kiel tuteŭropan, sed eĉ kiel „sistemon romana-germanan“.

Mi volas emfazi, ke la supre formulita regulo neniel malhelpas, ke ankaŭ ne-eŭropaj vortoj eniru la Esperanto-vortaron. Ĉiu rajtas proponi kaj ekuzi vortojn el ne-eŭropaj lingvoj, kondiĉe ke ne temas pri sinonimoj de fundamentaj aŭ oficialigitaj vortoj. Sed internaciaj vortoj en la senco de la 15-a regulo „plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo“ (LR 52), eĉ kiel sinonimoj de fundamentaj aŭ oficialigitaj vortoj.

Sen la supre eksplacitigitaj subkomprenaĵoj, eble ne tre plaĉaj, la statuso de multaj vortoj estus duba; kiel dirite, sinonimo de fundamenta aŭ oficialigita vorto estas permesata nur, se temas pri internacia vorto. Do, se oni ne (aŭ ne plu) akceptus la supre donitan interpreton, tiam povus okazi, ke delonge uzataj vortoj perdus sian ekzistorajton, aŭ montriĝus kontraŭ-regulaj. Nur la Akademio tiam povus savi ilin per oficialigo.

Se oni sisteme traserĉus tiujn ses plej ĉefajn lingvojn, tiam oni povus supozeble tre rapide kaj sisteme generi, eble helpe de komputoroj, ampleksan vortaron de internaciaj vortoj, eĉ tre novaj kaj aktualaj, kaj eĉ tre specialaj. Tiu ĉi povus esti granda paŝo al, kaj grava parto de la **Provizora Vortarego** arde sopirata de Zamenhof (vd. LR 55). Ĝi enhavus „ne sole ĉiujn vortojn de la ordinara vivo, sed ankaŭ ĉiujn vortojn teknikajn de ĉiuj sciencoj, artoj kaj metioj, ĉiujn nomojn geografiajn, historiajn, personajn k.t.p.“ Ĝian plenan unuecon garantius la priskribita sistemo mem; oni ĉiam prenu la (fonetikan) formon de la komuna fontolingvo kaj donu al ĝi la ortografion de la lingvo internacia.

Eĉ se oni ne akceptas nian reformuladon de la 15-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, ĝi estas ĝusta almenaŭ kiel regulo de la eksterfundamenta „Zamenhofa stilo“, kiu estas ne deviga, sed oficiale rekomendata de § 4 frazo 6 de la Bulonja Deklaracio. Tial oni tute bone jam nun povas verki, laŭ la priskribita maniero, Provizoran Vortaregon, sen atendi decidon de la Akademio, kiu forigus ĉiujn eventuale restintajn dubojn. Oni devas nur priatenti la malpermeson de sinonimoj de jam oficialigitaj vortradikoj, ĉar tiam ja ne temus pri sendube internaciaj vortoj, sed nur pri neoficialaj vortoj generitaj laŭ la Zamenhofa maniero.

Kritikaj rimarkoj pri kelkaj aktualaj variantoj de Esperanto

1. Enkonduko

Esperanto estas konstitucia lingvo. La kerno de la identeco de tia lingvo estas ĝia konstitucio - ĉe Esperanto do la Fundamento, leĝigita per la Bulonja Deklaracio.

La Fundamento donas grandan liberecon. Ĉar ĝi donas pri diversaj gramatikaj kaj stilaj demandoj nur norman kadron, kiu bezonas esti plenigita per detalaj normoj ne deriveblaj el la kadronormoj, tial povas ekzisti pluraj fundamentokonformaj variantoj de Esperanto. Mi nomas ilin „ortonomiaj variantoj de Esperanto“. Unu el ili estas la Zamenhofa stilo. Ĝi estas oficiale rekomendata (vd. § 4.6 de la Bulonja Deklaracio kaj Fundamento A3.5)^{53[30]}.

Varianton, kiu iurilate **sisteme** deflankiĝas de la Fundamento, mi nomas „paranomia“. Ekzistas kelkaj variantoj de Esperanto, kiuj parte, eĉ grandparte, sed **ne tute** konformas al la konstitucio de Esperanto. En la lastaj jaroj aperis kelkaj tiaj variantoj, kies aŭtoroj nek intencis la paranomiecon, nek konscias pri ĝi. Male, ili celas fundamentokonforme raciigi kaj plibonigi la lingvouzon kaj, pro miskompreno de la normaj bazoj de Esperanto, tute ne rimarkis, ke ili ie transpaŝis la konstituciajn limojn. Pro la unueco de Esperanto estas grave, malkaŝi kaj kritiki tiun kaŝitan kaj nekonscian paranomiecon kaj tamen savi ĉion bonan, kio estas akordigebla kun la konstitucio de Esperanto. Ĉi-sekve mi kritikos du el la plej aktualaj paranomiaj variantoj de Esperanto: la „logikan“ Esperanton de la „Analiza Skolo“, kaj la „spiritan“ Esperanton de G. F. Makkink. „ILO“ („Internacia Lingvo“), la oficiala lingvo de la Akademio Internacia de la Sciencoj, estas preskaŭ identa kun la Esperanto-varianto de la „Analiza Skolo“.

2. La „logika“ varianto de Esperanto („Analiza Skolo“)

2.1. Laŭda enkonduko

La esperantistaro ŝuldas dankon al la „Analiza Skolo“. La skolo rekonsciigis al ni i.a. la jenon:

- En Esperanto ekzistas devigaj normoj.

⁵³ Citita sub normesperantologia ekspertizeto n-ro 16.

- La „normiga forto de la faktoj“, la tradicio, en Esperanto estas klare limigita de tiuj bazaj normoj.
- La pluan evoluon de Esperanto gvidu ne blinda hazardo, sed laŭeble ia lingvoteknologia racio (kiun la skolo nomas „logiko“).

Sed ekzistas ankaŭ kritikindaj trajtoj de la skolo, kvankam ĝi strikte obeas la FG-n kaj la UV-n kaj pro tio laŭ sia ekstera aspekto estas tute ortonomia: Ĝi malatentas gravajn konstituciajn normojn de Esperanto kaj miskomprenas la rolon de la partoj de la Fundamento kaj ilian interagadon. Tial ĝi laŭ sia norma bazo estas paranomia. Ni prilumos tion el la vidpunkto de la norma esperantologio.

2.2. La principoj de la Esperanto-varianto de la „Analiza Skolo“

Laŭ la doktrino de la „Analiza Skolo“, formulita de Ŝulco (1987, 1991), la Internacia Lingvo baziĝas sur du principoj:

- **Nur** la deksexregula Fundamenta Gramatiko kaj la Universala Vortaro konsistigas la „bazan kodon“ de Esperanto.
- Al tiu ĉi baza kodo estas aplikenda la logiko.

Laŭ Ŝulco (1985) la „Kvinlingva Gramatiko vere permesas per apliko de la logiko determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj.“

Praktike al la du bazaj principoj aldoniĝas pliaj normoj, kies teoria statuso estas tute neklara.

2.2.1. Kritiko de la „baza kodo“ de la „Analiza Skolo“

La difino de la „baza kodo“ ne konformas al la aktuale valida normaro de la lingvo. Sub punkto 5. de mia artikolo „Mallonga enkonduko en la norman esperantologion“, citante la koncernajn leĝajn normojn, mi iom detale klarigis la jenon: **Norma bazo de Esperanto estas la tuta Fundamento.** Al ĝi apartenas ne nur Gramatiko kaj Universala Vortaro, sed ankaŭ Antaŭparolo kaj Ekzercaro, kvankam la Antaŭparolo ne estas deviga kiel lingva modelo, sed nur kiel „metagramatika“ kaj institucia regularo. Gramatiko, Ekzercaro kaj Universala Vortaro estas tute **samrangaj**; pro tio kaze de kontraŭdiroj inter Gramatiko kaj Ekzercaro validas neniel nur la Gramatiko, sed la Ekzercaro donas esceptan permeson.

Ŝulco rajtas kritiki tiun staton de nia normaro, sed kiel unuopulo li ne rajtas ŝanĝi ĝin:

Bulonja Deklaracio § 4.1 Esperanto havas nenium personan leĝdonanton kaj dependas de neniu aparta homo.

2.2.2. Kritiko de la „logiko“ de la „Analiza Skolo“

La „Analiza Skolo“ trotaksas la eblecojn de la logiko, opiniante, ke la „Kvinlingva Gramatiko vere permesas per apliko de la logiko determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj“ (Ŝulco 1985). Bv. legi la punkton 7 de mia artikolo „Mallonga enkonduko en la norman esperantologion“. Iel la dirita opinio similas al la iluzio, ke oni povas logike dedukti la tutan aktuale validan leĝaron de ŝtato simple el ties konstitucio.

La planlingvoteknologiaj postuloj konsistigas planlingvoteknologian licencon malobei sub certaj kondiĉoj la regulojn kaj modelojn de la Ekzer-caro^{54[31]}. La aplikado de tiu ĉi licenco en ĉiutaga, malpreciza lingvouzo ofte estas nomata „logiko“, ankaŭ de Zamenhof. La skolo prenas tion tute laŭ-vorte, kaj tial por ĝi ne temas pri nura **licenco**, sed ĉiam pri la aplikado de la **deviga**, unusola, por ĉiuj homoj valida logiko mem. Tiu kredo malfaciligas al la skolo entute ĝuste **kompreni** certajn kritikojn kaj kontraŭargumentojn, kaj sorbigas ĝiajn eldirojn per la morala patoso de la sola heroldo de vero kaj savo en mondo de erarantoj kaj ignorantoj. La skolo emas en la nomo de la neerarpova logiko kategorie ordoni aŭ malpermesi, kie eblas nur modestaj privataj konsiloj, kiuj, eĉ se akcepteblaj aŭ akceptindaj, neniel estas devigaj. Ĝi firme kredas, ke en la logiko ĝi posedas la universalan solvometodon por ĉiuj lingvaj problemoj.

2.2.3. Kritiko de la aldonaj principoj

Praktike la metodo de la „Analiza Skolo“ estas - kaj devas esti - pli kaj io alia ol aplikado de pura logiko al „baza kodo“: Kie la voĉo de la „baza kodo“ silentas - kaj ĝi prisilentas gravajn demandojn -, tie ankaŭ la logiko nenion diras. Tamen la „Analiza Skolo“ aŭdas ion en tiu silento. Kion? Ĝi aŭdas la voĉon de diversaj **aldonaj normoj**, kiujn ĝi simple premisas sen logike dedukti ilin el sia „baza kodo“. Jen ĝi projekcias ilin en la normaron de la logiko, jen rekte en la „bazan kodon“ mem, jen ili malkaŝe ekzistas kvazaŭ neleĝaj enmigrintoj, kiujn tamen neniu demandas pri iliaj pasportoj, ĉar ili estas nemalhaveblaj laboristoj.

Alie dirite, krom la „baza kodo“ ekzistas ia suplementa baza kriptokodo. Trarigardante la verkojn de la skolo, oni ekkonas, ke i.a. temas pri

- lingvoteknologiaj postuloj kiel simpleco kaj kohereco,
- etimologiaj konjektoj (Ŝulco 1987, p. 56),
- ia „logika instinkto“ (Ŝulco 1987, p. 194, p. 196), kiu ne klare estas distingebla de romanista lingvosento,

⁵⁴ Vd. sub punkto 5.1.3. de „Mallonga enkonduko ...“.

- la reguloj kaj modeloj de la Ekzercaro (!) (Ŝulco 1991, p. 11).

Krome, aŭtoritatan, kvazaŭ-norman karakteron havas ankaŭ la verkaro de Ludoviko Mimoo.

Rangoj kaj interrilatoj de la aldonaj principoj restas sufiĉe neklaraj. La emocia, retorika stilo de Ŝulco kaŝas la problemojn, la nekonsekvencaĵojn kaj internajn kontraŭdirojn de la doktrino kaj de ĝia aplikado.

La oficiala senvalidigo de la Ekzercaro kompreneble estigas grandan sen-norman spacon. Tiun sennorman spacon la skolo replenigas per normoj de malpli alta rango, re-promociante Ekzercaron kaj Antaŭparolon almenaŭ „respektindaj gravaj modeloj de nia lingvo“. Tia respektindeco neniel estas pravigebla el la teoriaj principoj de la skolo, nome el la „baza kodo“ kune kun la logiko. Se „baza kodo“ kaj logiko vere sufiĉus por „determini la tutan lingvon ĝis la plej lastaj detaloj“, la skolo ja ne bezonus tiajn „respektindajn modelojn“. Temas pri re-enkonduko de la Ekzercaro kiel baza, kvankam hierarkie malpli alta normaro. Spite al la oficiala doktrino de la skolo, la Fundamenta Gramatiko kaj la Universala Vortaro do fakte por ĝi ne estas la solaj, sed nur la prioritataj elementoj de la „baza kodo“.

2.3. Pliaj kritikaj rimarkoj

En la apendico de la libro „Sur la vojoj de la Analiza Skolo (Ŝulco 1987, p. 257) troviĝas resuma „regularo“. Kelkajn punktojn de tiu „regularo“ mi komentarios ĉi-sube. Unue mi citos la tekston de Ŝulco (kursivlitere); poste mi donos mian kritikan komenton.

- **Aserto:** „*Dank' al*“ anstataŭ „*danke al*“ estas evitenda.

Kritika komentario : „*Dank' al*“ estas tute bona, gramatike ĝusta Esperanto; vd. la normesperantologian ekzertizeton n-ro 14. Eĉ se la esprimo estus evitinda, ĝi nepre ne estas evitenda.

- **Aserto:** *Esperantisto estas, kiu senrezerve agnoskas la deksexregulan Fundamentan regularon kiel bazon de logika gramatiko.*

Kritika komentario : „Senrezerve agnoski la deksexregulan Fundamentan regularon kiel bazon de logika gramatiko“ - ĉe tio Ŝulco subkomprenas „malagnoski la Fundamentecon de la Ekzercaro“. Lia nova difino nek eksplicite, nek koncerne la subkomprenaĵojn konformas al la Bulonja Deklaracio:

Bulonja Deklaracio § 5 Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas.

Ŝulco malkaŝe konfesas tion (Ŝulco 1987, p. 28). Li pretervidas, ke la Bulonja Deklaracio estas **leĝo**, grava leĝo, kiu ne povas esti malvalidigita

per kiel ajn prudentaj konsideroj de unuopulo, sed nur per decido de kongreso, do de tiu organo, kiu iam validigis la Deklaracion, kaj, pere de ĝi, la tutan Fundamenton, inkluzive la Ekzercaron. Li pretervidas, ke malvalidigi gravan parton de la ĝisnunaj normaj bazoj de Esperanto, eĉ se tiuj estas ne tute perfektaj, signifus tre danĝeran rompon, iusence eĉ la estigon de nova planlingvo - nova senkonsidere de ties simileco al la ĝisnuna Esperanto. Legu en LR 141: „Nia lingvo ĉiam konservu severan **unuecon**, kiu por lingvo estas multe pli necesa, ol ĉiu ŝajna aŭ eĉ vera perfekteco.“ Plibonigi la lingvouzon oni rajtas ankaŭ enkadre de la ĝisnuna normaro; sed kompreneble la rezultoj de la „Analiza Skolo“ en tiu kadro povas esti nur pli-malpli valoraj konsiloj, ne leĝoj, kiuj pravigus nomi „erara“ ĉiun alian lingvouzon.

• **Aserto:** „Tiel/kiel“ *komparas manierojn de verbaj agoj*, „tiom/kiom“ *komparas gradojn de ecoj aŭ manieroj*.

Kritika komentario: Sub la premiso, ke la Ekzercaro ne validas, Ŝulco pravus. Sed tiu premiso estas, kiel dirite, malĝusta. (Ekstere de Esperanto, en parenca planlingvo kun propra normaro, ĝi povas esti ĝusta.) La situacio estas pli komplika: Vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 17.

• **Aserto:** „-iĝ“ *signifas nevole transiri en la staton de la radiko*.

Kritika komentario: La sufikso „-iĝ“ signifas transiri en la staton esprimatan de la radiko, prisilentante la volatecon aŭ nevolatecon de tiu transiro; vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 16.

• **Aserto:** *Infinitivo ne povas esti flanka elemento de kunmetita vorto*.

• **Aserto:** *La vortoj kunmetitaj estas formataj per simpla kunigo de la vortoj. La precipa vorto staras en la fino, kaj ĝi povas esti substantivo, adjektivo aŭ verbo; la flanka vorto povas esti nur substantivo laŭsence enkondukita per prepozicio. Tamen la prepozicio ĉiam forestas.* (Ludoviko Mimoo).

Kritika komentario: Oni komparu tiun regulon kun la 11-a regulo de la Fundamenta Gramatiko, kaj oni tuj ekkonos, kion Ludoviko Mimoo aldonis:

Fundamento R 11a Compound words are formed by the simple junction of roots, (the principal word standing last) ...

La 11-a regulo **nenion** preskribas pri vortspecoj. Estas vero, ke la modeloj de la Ekzercaro klare montras la tendencon, substantivigi verbajn flankelementojn. Pri la kialo legu la normesperantologian ekspertizeton n-ro 9. Ne temas pri memstara principo, sed pri ofta (neniel ĉiama) sekvo de la postulo pri klareco.

La Mimeo regulo projekcias konvenan analizometodon, per kiu ekz. parolantoj de latinidaj lingvoj ofte (**sed tute ne ĉiam!**) povas klarigi al si la sencon de kunmetita vorto, kiel gramatikan kriptoregulon en la strukturon de la lingvo mem.

2.4. Resumo

La „Analiza Skolo“ kuŝas sur parte malfirma fundamento. Laŭ juraj kriterioj ĝia „baza kodo“ ne estas la kompleta valida baza normaro de Esperanto; ĝi malĝuste difinas la rangrilatojn inter la partoj de la Fundamento; ĝia „logiko“ estas ne identa kun „la komune homa logiko“. Tial ĝi fariĝu pli modesta. Ĝi estu retenema pri absolutaj kondamnoj; ĝi estu retenema pri la starigo de reguloj deklaritaj, en la nomo de la neerarpova logiko, nepre obeendaj. Ĝi povas doni valorajn kaj pripensindajn konsilojn, ne pli; sed tio jam estas multo. Ĝia plej valora efiko estas, ke ĝi instigadas nin, rigardi Esperanton el norma kaj lingvoteknologia vidpunkto, ĉar tia vidpunkto pleje konformas al la esenco de norma lingvo, de planlingvo; kaj se nenio alia, tio espereble restos de la „Analiza Skolo“.

3. La „spirita“ varianto de Esperanto (G.F. Makkink)

3.1. La principoj de la Makkinka Esperanto

La Esperanto de Makkink, priskribita en lia libro „Nia Fundamento sub lupeo“, baziĝas sur jenaj normoj:

- La „spirito“ de Esperanto, konkretigita en dek principoj: natureco, internacieco, simpleco, reguleco, kohero, klareco, logikeco, libereco, neceso kaj sufiĉo, bonsoneco.
- La Fundamento.
- La Eksterfundamentaj Fundamentaĵoj: Lingvaj Respondoj, la 16 paragrafoj kun paradigmoj en Dua Libro de l' lingvo internacia⁵⁵, citaĵo el Lippmann en aldonaĵo al la gramatiko de Fruictier el 1930.⁵⁶

⁵⁵ [pb]: La Dua Libro el 1888 estas speco de „Praekzercaro“, detalojn vd. en BK I.

⁵⁶ [pb]: La gramatiko de Fruictier: Paul Fruictier [W]. Esperanta Sintakso. Paris 1903. 2a prilaborita eldono sub la titolo Komplete Gramatiko kaj Vortfarado de Esperanto, reviziita kaj kompletigita de Salo Grenkamp-Kornfeld. Jaslo [Pollando]: Esperantista Voĉo [t.e. Grenkamp] 1930 [W].

3.1.1. Kritikaj rimarkoj pri la rolo de la „spirito“

Ĉe la „spirito“ grandparte temas pri principoj de racia lingvoplanado, do pri la lingvoteknologiaj gvidprincipoj^{57[32]}. Ili gvidis kaj gvidas la lingvoplanadon, ili estas stilprincipoj, sed ili ne senpere havas gramatike leĝan karakteron. Eĉ se ili havus tian karakteron, pro la juroscienca principo „lex specialis derogat legi generali“ (pli speciala normo, kaze de kolizio, sur sia tereno, malvalidigas ĝeneralan normon) ili **ne** malvalidigus iujn konkretajn normojn de la Fundamento. (Iom pli komplika estas la afero nur rilate la Ekzercaron, kie la principoj sub certaj kondiĉoj donas **licencon** - neniel malvalidigante iujn normojn -, sed tiun specialan temon ni ĉi tie ne bezonas konsideri^{58[33]}).

Malvalidigan forton la gvidprincipoj havus nur, se ili apartenus al leĝo **pli altranga** ol la Fundamento. Evidente por Makkink tiu „spirito“ estas ĝuste tia leĝo; alivorte: La gvidprincipoj konsistigas por li ian „Super-Fundamenton“ (Makkink entuziasme nomas ĝin „Fundamenta Dekalogo“), kiu kaze de kolizio malvalidigas normojn de la Fundamento.

En la aplikado de la principoj regas granda arbitreco: Makkink konsideras nek la eventualajn kontraŭdirojn inter tiuj principoj, nek la malsamecojn de ilia gravecoj; krome mankas gravaj lingvoteknologiaj gvidprincipoj, nome unueco (la plej grava, laŭ Zamenhof!) kaj iom-post-iomeco. Tiu nekontrol-ebla arbitreco ebligus laŭdezire deklari malvalida praktike ĉiun neplaĉan normon de la Fundamento kaj anstataŭigi ĝin per pli plaĉa. Idistoj kun intereso legos tion.

Sed trankviliĝu: Leĝigi tiujn gvidprincipojn kiel ian Super-Fundamenton normsience premias oficialan leĝan sankcion fare de la tuta esperantistaro; ĉar tio ne okazis, temas pri privata normiga ago de Makkink mem. Sed:

Bulonja Deklaracio § 4.1 Esperanto havas neniun personan leĝdonanton kaj dependas de neniun aparta homo.

Do la normiga ago de Makkink estas **nevalida**.

3.1.2. Kritika rimarko pri „eksterfundamenta fundamenteco“

Ankaŭ por „eksterfundamenta fundamenteco“ ekzistas nenia norma bazo. Enkonduki ĝin estus plia normiga ago, por kiu Makkink kiel unuopulo ne havas la povon. Tamen la tekstoj menciitaj de Makkink estas gravaj; ili estas

⁵⁷ Vd. sub punkto 5.1.3. kaj 6. de „Mallonga enkonduko ...“.

⁵⁸ Vd. sub punkto 5.1.3. de „Mallonga enkonduko ...“.

duonoficialaj lingvaj modeloj^{59[34]}, rekomendataj al imitado (vd. § 4.6 de la Bulonja Deklaracio^{60[35]}).

3.2. Unuopaj pliaj kritikaj rimarkoj

3.2.1. La Antaŭparolo de la Fundamento

La Antaŭparolo de la Fundamento ne estas rekte lingvonormiga, ĉar ĝi mem eksplicite rezervas tiun rolon al la Gramatiko, la Ekzercaro kaj la Universala Vortaro (vd. A 2.3.^{61[36]}). Tiuj partoj konsistigas la Fundamenton en malpli vasta senco. Pro la Bulonja Deklaracio kune kun A 11 ankaŭ la Antaŭparolo apartenas al la netuŝebla Fundamento. Pli prezice: ĝiaj ideoj, ne ĝia lingvaĵo^{62[37]}. Ĝi ne estas rekte lingvonormiga parto, sed „metagramatika“ kaj institucia regularo. Alivorte, deviga lingva modelo ĝi ne estas; ĝi estas nur rekomendata laŭ § 4.6 de la Bulonja Deklaracio^{63[38]}. Makkink kaj multaj aliaj spertaj esperantistoj pretervidas tion.

3.2.2. La skribmaniero de numeraloj

La disigeo de numeraloj kiel en „la dudek dua de Februaro“, alie ol Makkink opinias, tute ne estas kontraŭfundamenta, ĉar: 1. Ĝi troviĝas en la Fundamento mem (Fundamento § 12.19). 2. La vortfina streketo en la Universala Vortaro signifas, ke la radiko aŭ havu gramatikan finaĵon aŭ rekte algluiĝu al sekvanta radiko. Sen streketo ĝi postulas nek finaĵon nek rektan algluiĝon. La numeraloj ne havas streketon en la Universala Vortaro; pri la kuna aŭ disa skribado do decidas nur stilaj konsideroj, ĉefe koncerne klarecon kaj nemiskompreneblecon.

3.2.3. Aliloke pritraktitaj temoj

Kritikojn pri jenaj temoj pritraktitaj de Makkink oni povas trovi aliloke:

- Ĉu en la Fundamento troviĝas eraroj? Vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 1.
- Pri la uzado de la artikolo: vd. normesperantologian ekspertizeton n-ro 7.
- Ĉu duoblaj konsonantoj interne de radiko estas kontraŭfundamentaj? Vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 5.

⁵⁹ Vd. sub punkto 5.2. de „Mallonga enkonduko ...“.

⁶⁰ Citita sub punkto 4.4. de „Mallonga enkonduko ...“.

⁶¹ [36] Citita sub punkto 5.1.1. de „Mallonga enkonduko ...“.

⁶² [37] A 11.2 estas citita sub punkto 4.1. de „Mallonga enkonduko ...“. Ke nur la **ideoj** (do ne la lingvaĵo) ricevis leĝan sankcion, sekvas el Fundamento A 11.1.

⁶³ [38] Citita sub punkto 4.4. de „Mallonga enkonduko ...“.

- La kontraŭfundamenteco de „far“, „rilat“, k.t.p.: vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 13.
- La kontraŭfundamenteco de „aliu“, „alies“, „aliam“ k.t.p.: vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 12.
- La duonvokalo „u“ (kun hoketo) estu uzata nur post vokaloj: vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 4.
- La kontraŭreguleco de seksneŭtrala pronomo „gi“ (sen supersigno): vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 2.
- La kontraŭreguleco aŭ neuzindeco de la personaj pronomoj „imi“, „miŝi“, „mili“ k.t.p.: vd. la normesperantologian ekspertizeton n-ro 2.

3.3. Resumo

En la preparolita libro de Makkink troviĝas multaj interesaj, pripensindaj konsideroj kaj proponoj. El normscienca vidpunkto, grava, danĝera, kaj riĉa je konsekvencoj eraro estas lia opinio, ke la „spirito de la Fundamento“ povas malvalidigi konkretajn unuopajn regulojn de la Fundamento. Pro ĝi Makkink ne plu povas distingi inter normoj jam validaj unuflanke, kaj (eble) enkondukindaj de la Akademio de Esperanto aliflanke. Iusence li per tio nekonscie estigis propran reformitan varianton de Esperanto.

Literaturo

BORMANN, W.: Bona ŝanco, Dek du prelegoj pri la Internacia Lingvo kaj Sociaj Sciencoj. La Laguna, Stafeto, 1970.

BORMANN, W.: Evoluinta kompreno de Interlingvistiko. En: GrKG 1992/1, p. 3-6.

FRANK, H.: Denkanstößiges zum Schlüsselproblem der internationalen Kommunikation. Paderborn: Institut für Kybernetik der AIS 1992.

FRANK, H., YASHOVARLAN, BARANDOVSKA, V.: Kiel utile difini la nocion „interlingvistiko“? En: GrKG 1991/4, p. 182–185.

FRANK, H.: Zur kybernetischen Rechtfertigung einer axiomatischen Interlinguistik. En: GrKG 1985/2, p. 71-82.

KALOCSAY, K., WARINGHIEN, G.: Plena Analiza Gramatiko de Esperanto. 4-a eld. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio 1980 [nun iom reviziita 5a eld. Rotterdam 1985].

KALOCSAY, K.: Vojaĝo inter la tempoj. Gramatika studo. La Laguna: Stafeto 1964.

LÖTZSCH, R.: Tempus, Passiv und Aspektualität im Esperanto (zur -ata-/-ita--Problematik). En: ZPSK 1991/4, p. 402-414.

MAKKINK, G. F.: Nia Fundamento sub Lupeo. Antwerpen: Flandra Esperanto-Ligo 1990.

POPPER, K. R.: Die offene Gesellschaft und ihre Feinde, Bd. 2. München: A. Francke, 6. Aufl. 1980, p. 389.

REIERSØL, O.: Aspektismaj reguloj pri la uzo de verbaj formoj en Esperanto. Nøtterøy: Aŭtoro 1990.

REIERSØL, O.: Participoj kaj konjugaciaj formoj en Esperanto. Nøtterøy: Aŭtoro 1980.

STACHOWIAK, H.: Gedanken zu einer pragmatischen Theorie der Interlinguistik. En: GrKG 1986/1, p. 3-11.

STACHOWIAK, H.: Interlinguistische Theorie im „non statement view“. En: GrKG 1987/1, p. 11-18.

STACHOWIAK, H.: Methodologische Bemerkungen zur Axiomatisierung der Interlinguistik. En: GrKG 1985/2, p. 82-85.

ŜULCO (SCHULZ), R.: La Analiza Skolo antaŭ la Maloveca tribunalo. Paderborno: Esperanto-Centro 1991.

ŜULCO (SCHULZ), R.: La esenco de la Analiza Skolo. Paderborno: Esperanto-Centro 1991.

ŜULCO (SCHULZ), R.: La sesa regulo. Kajero 1, kajero 2, solvaro. 2-a eld. Paderborno: Esperanto-Centro 1991.

ŜULCO (SCHULZ), R.: Notoj pri la aksiomado de la internacia lingvo. En: GrKG 1985/3, p. 130.

ŜULCO (SCHULZ), R.: Noto pri la scienceco de la internacia lingvo. En: GrKG 1985/1, p. 31-37.

ŜULCO (SCHULZ), R.: Pledo por unueca lingvo. Paderborn: Esperanto-Centro 1985.

ŜULCO (SCHULZ), R.: Sur la vojoj de la Analiza Skolo. 1-a eld. Paderborno: Esperanto-Centro 1987.

WELGER, H.: Die Analiza Skolo und die Logik. Marburg: Info-Servo 1994.

WELGER, H.: Kelkaj lingvojuristaj ekspertizetoj. En: GrKG / Human-kybernetik 1992/2, p. 53-58.

WELGER, H.: Mallonga enkonduko en la konstitucian juron de ILo. En: GrKG / Humankybernetik 1992/1, p. 32-40.

WELGER, H.: Pri la dezirendaj (!) neperfektaĵoj de planlingvo. En: Naturista Vivo n-ro 6/7, 1981, p. 27-30.

ZAMENHOF, L. L.: Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia. En: L.L. Zamenhof, Originala Verkaro, kolektita kaj eldonita de D-ro Joh. Dietterle. Leipzig: Hirt & Sohn 1929.

ZAMENHOF, L. L.: Fundamento de Esperanto. Marmande: Esperantaj Francaj Eldonoj, 9-a eld. 1963 [nun enhave senŝanĝa 11-a eld. 2007].

ZAMENHOF, L. L.: Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof kajero 7. Ludovikito, Kioto 1980.

ZAMENHOF, L. L.: Iam kompletigota plena verkaro de L.L. Zamenhof, kajero 8. Eldonejo Ludovikito [t.e. Itô Kanz], 1980.

ZAMENHOF, L. L.: Lingvaj Respondoj. Konsiloj kaj opinioj pri Esperanto. Marmande: 6-a eld. Esperantaj Francaj Eldonoj 1962 [nun pliampleksita 7-a eld. Kioto 1990].

ZAMENHOF, L. L.: Originala Verkaro. Leipzig, Hirt & Sohn, 1929.

Indekso de cititaj normtekstoj

La numeroj indikas la paĝojn en la originalo de 1999.

Bulonja Deklaracio § 1.1: p. 11

Bulonja Deklaracio § 1.2: p. 11

Bulonja Deklaracio § 3.2: p. 16

Bulonja Deklaracio § 4.1: p. 38, p. 43

Bulonja Deklaracio § 4.2: p. 30

Bulonja Deklaracio § 4.3: p. 6, p. 30

Bulonja Deklaracio § 4.5: p. 6, p. 10

Bulonja Deklaracio § 4.6: p. 5, p. 16

Bulonja Deklaracio § 5: p. 3, p. 40

Projektita Teksto de la Bulonja Deklaracio § 5: p. 32

Fundamento A 1.2: p. 4

Fundamento A 1.3: p. 4

Fundamento A 2: p. 7

Fundamento A 2.2: p.1 (piednoto)

Fundamento A 3.4.1: p. 10

Fundamento A 3.4.2: p. 8 (piednoto)

Fundamento A 3.5: p. 30

Fundamento A 4: p. 14

Fundamento A 7.5: p. 5, p. 31

Fundamento A 8: p. 9

Fundamento A 9.3: p. 5

Fundamento A9.4: p. 5

Fundamento A 10.2: p. 32

Fundamento A 10.4: p. 5, p. 31

Fundamento A 11.2: p. 4

Fundamento R 0g: p. 18

Fundamento R 1e: p. 19

Fundamento R 4g: p. 15

Fundamento R 5a: p. 15

Fundamento R 5e: p. 28

Fundamento R 5f: p. 15

Fundamento R 5g: p. 15

Fundamento R 11a: p. 23, p. 41

Fundamento R 11e: p. 16

Fundamento R 16e: p. 27

Fundamento § 12.19: p. 22 (piednoto)

Fundamento § 16.16: p. 28

Fundamento § 22.12: p. 22

Fundamento § 25.22: p. 21

Fundamento § 27.5: p. 23

Fundamento § 39.13: p. 28

Oka Oficiala Aldono al la UV, II.B/1: p. 32

Projekto de Regularo de Tutmonda Ligo Esperantista § 11 frazo 3: p. 33

Regularo de la Ligo Internacia de Esperantistoj (1890) § 1: p. 34

Antaŭparolo al la Fundamento de Esperanto (1905)

Ni represas tie ĉi nur la tekston de la Antaŭparolo kun niaj indikoj pri numeroj de alineoj kaj (duon-) frazoj en rektaj krampoj (ekz. „[A 1.1]“) kaj la neoficialajn titolojn de la alineoj. La kursivaj elstarigoj estas originalaj. Detalan komentarion pri la Antaŭparolo vd. en BK I.

Nedisigebla de la Antaŭparolo kaj kune interpretebla kun ĝi estas la „Deklaracio pri la Esenco de la Esperantismo“ de 1905, mallonge nomita „Bulonja Deklaracio“ (BD). Ĝian tekston kun niaj komentoj oni same trovas en BK I.

Antaŭparolo

[Defio: Gardi la unuecon]

[1] Por ke lingvo internacia povu bone kaj regule progresadi kaj por ke ĝi havu plenan certecon, ke ĝi neniam disfalos kaj ia facilanima paŝo de ĝiaj amikoj estontaj ne detruos la laborojn de ĝiaj amikoj estintaj, - estas plej necesa antaŭ ĉio unu kondiĉo: la ekzistado de klare difinita, neniam tuŝebla kaj neniam ŝanĝebla **Fundamento** de la lingvo [A 1.1]. Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la *registaroj* de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj plenan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj [A 1.2]; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta [A 1.3]. Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton arbitre fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon! [A 1.4] Tiun ĉi tre gravan principon la esperantistoj volu ĉiam bone memori kaj kontraŭ la ektuŝo de tiu ĉi principo ili volu ĉiam energie batali, ĉar la momento, en kiu ni ektuŝus tiun principon, estus la komenco de nia morto [A 1.5].

[De silenta al eksplicita komuna interkonsento]

[2] Laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de tre longa tempo la sekvantaj tri verkoj estas rigardataj kiel fundamento de Esperanto: 1.) La 16-regula gramatiko; 2) la « Universala Vortaro »; 3) la « Ekzercaro »

[A 2.1]. Tiujn ĉi tri verkojn la aŭtoro de Esperanto rigardadis ĉiam kiel *leĝojn* por li, kaj malgraŭ oftaj tentoj kaj delogoj li neniam permesis al si (almenaŭ *konscie*) eĉ la plej malgrandan pekon kontraŭ tiuj ĉi leĝoj [A 2.2]; li esperas, ke pro la bono de nia afero ankaŭ ĉiuj aliaj esperantistoj ĉiam rigardados tiujn ĉi tri verkojn kiel la solan leĝan kaj netuŝeblan fundamenton de Esperanto [A 2.3].

[„Oficiala“ (deviga) kontraŭ „privata“ (nur rekomendita)]

[3] Por ke ia regno estu forta kaj glora kaj povu sane disvolviĝadi, estas necese, ke ĉiu regnanto sciu, ke li neniam dependos de la kapricoj de tiu aŭ alia persono, sed devas obei ĉiam nur klarajn, tute difinitajn fundamentajn leĝojn de sia lando, kiuj estas egale devigaj por la regantoj kaj regatoj kaj en kiuj neniu havas la rajton fari arbitre laŭ persona bontrovo ian ŝanĝon aŭ aldonon [A 3.1]. Tiel same por ke nia afero bone progresadu, estas necese, ke ĉiu esperantisto havu la plenan certecon, ke leĝodonanto por li ĉiam estos ne ia persono, sed ia klare difinita verko [A 3.2]. Tial, por meti finon al ĉiuj malkompreniĝoj kaj disputoj, kaj por ke ĉiu esperantisto sciu tute klare, per kio li devas en ĉio sin gvidi, la aŭtoro de Esperanto decidis nun eldoni en formo de unu libro tiujn tri verkojn, kiuj laŭ silenta interkonsento de ĉiuj esperantistoj jam de longe fariĝis fundamento por Esperanto, kaj li petas, ke la okuloj de ĉiuj esperantistoj estu ĉiam turnataj ne al li, sed al tiu ĉi libro [A 3.3]. Ĝis la tempo, kiam ia por ĉiuj aŭtoritata kaj nedisputebla institucio decidus alie, ĉio, kio troviĝas en tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel deviga por ĉiuj; ĉio, kio estas kontraŭ tiu ĉi libro, devas esti rigardata kiel malbona, se ĝi eĉ apartenus al la plumo de la aŭtoro de Esperanto mem [A 3.4]. Nur la supre nomitaj tri verkoj publikigitaj en la libro « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardataj kiel oficialaj [A 3.5]; ĉio alia, kion mi verkis aŭ verkos, konsilas, korektas, aprobas k. t. p., estas nur verkoj privataj, kiujn la esperantistoj - se ili trovas tion ĉi utila por la unueco de nia afero - povas rigardadi kiel modela, sed ne kiel deviga [A 3.6].

[Interpretado per kunteksta komparo]

[4] Havante la karakteron de fundamento, la tri verkoj represitaj en tiu ĉi libro devas antaŭ ĉio esti netuŝeblaj [A 4.1]. Tial la legantoj ne miru, ke ili trovos en la nacia traduko de diversaj vortoj en tiu ĉi libro (precipe en la angla parto) tute nekorektite tiujn samajn erarojn, kiuj sin trovis en la unua eldono de la « Universala Vortaro » [A 4.2]. Mi permesis al mi nur korekti la preserarojn; sed se ia vorto estis erare aŭ nelerte tradukita, mi ĝin lasis en tiu ĉi libro tute senŝanĝe; ĉar se mi volus plibonigi, tio ĉi jam estus ŝanĝo, kiu povus kaŭzi disputojn kaj kiu en verko fundamenta ne povas esti tolerata [A 4.3]. La fundamento devas resti severe netuŝebla eĉ kune kun siaj eraroj [A 4.4]. La erareco en la nacia traduko de tiu aŭ alia vorto ne prezentas

grandan malfeliĉon, ĉar, komparante la kuntekstan tradukon en la aliaj lingvoj, oni facile trovos la veran sencon de ĉiu vorto [A 4.5]; sed senkompare pli grandan danĝeron prezentus la ŝanĝado de la traduko de ia vorto, ĉar, perdinte la severan netuŝeblecon, la verko perdus sian eksterordinare necesan karakteron de dogma fundamenteco, kaj, trovante en unu eldono alian tradukon ol en alia, la uzanto ne havus la certecon, ke mi morgaŭ ne faros ian alian ŝanĝon, kaj li perdus sian konfidon kaj apogon [A 4.6]. Al ĉiu, kiu montros al mi ian nebonan esprimon en la Fundamenta libro, mi respondos trankvile: jes, ĝi estas eraro, sed ĝi devas resti netuŝebla, ĉar ĝi apartenas al la fundamenta dokumento, en kiu neniu havas la rajton fari ian ŝanĝon [A 4.7].

[Fundamento kiel gvida kontrol-dokumentoj]

[5] La « Fundamento de Esperanto » tute ne devas esti rigardata kiel la plej bona lernolibro kaj vortaro de Esperanto [A 5.1]. Ho, ne! [A 5.2] Kiu volas perfektigi en Esperanto, al tiu mi rekomendas la diversajn lernolibrojn kaj vortarojn, multe pli bonajn kaj pli vastajn, kiuj estas eldonitaj de niaj plej kompetentaj amikoj por ĉiu nacio aparte kaj el kiuj la plej gravaj estas eldonitaj tre bone kaj zorgeme, sub mia persona kontrolo kaj kunhelpo [A 5.3]. Sed la « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu bona esperantisto kiel konstanta gvida dokumento, por ke li bone ellernu kaj per ofta enrigardado konstante memorigadu al si, kio en nia lingvo estas oficiala kaj netuŝebla, por ke li povu ĉiam bone distingi la vortojn kaj regulojn oficialajn, kiuj devas troviĝi en ĉiuj lernoverkoj de Esperanto, de la vortoj kaj reguloj rekomendataj private, kiuj eble ne al ĉiuj esperantistoj estas konataj aŭ eble ne de ĉiuj estas aprobatataj [A 5.4]. La « Fundamento de Esperanto » devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco [A 5.5].

[Evoluipovo malgraŭ netuŝebleco]

[6] Mi diris, ke la fundamento de nia lingvo devas esti absolute netuŝebla, se eĉ ŝajnus al ni, ke tiu aŭ alia punkto estas sendube erara [A 6.1]. Tio ĉi povus naski la penson, ke nia lingvo restos ĉiam rigida kaj neniam disvolviĝos ... [A 6.2] Ho, ne! Malgraŭ la severa netuŝebleco de la fundamento, nia lingvo havos la plenan eblon ne sole konstante riĉiĝadi, sed eĉ konstante pliboniĝadi kaj perfektigi [A 6.3]; la netuŝebleco de la fundamento nur garantios al ni konstante, ke tiu perfektigado fariĝados ne per arbitra, interbatala kaj ruiniga rompado kaj ŝanĝado, ne per nuligado aŭ sentaŭgigado de nia ĝisnuna literaturo, sed per vojo natura, senkonfuza kaj sendanĝera [A 6.4]. Pli detale mi parolos pri tio ĉi en la Bulonja kongreso [A 6.5]; nun mi diros pri tio ĉi nur kelkajn vortojn, por ke mia opinio ne ŝajnu tro paradoksa [A 6.6]:

[„Novaj vortoj“]

[7] 1) ^[1] Riĉigadi la lingvon per novaj vortoj oni povas jam nun, per konsiliĝado kun tiuj personoj, kiuj estas rigardataj kiel la plej aŭtoritataj en nia lingvo, kaj zorgante pri tio, ke ĉiuj uzu tiujn vortojn en la sama formo; ^[2] sed tiuj ĉi vortoj devas esti nur rekomendataj, ne altrudataj; ^[3] oni devas ilin uzadi nur en la literaturo; ^[4] sed en korespondado kun personoj nekonataj estas bone ĉiam peni uzadi nur vortojn el la « Fundamento » ĉar nur pri tiaj vortoj ni povas esti certaj, ke nia adresato ilin nepre trovos en sia vortaro [A 7.1]. Nur iam poste, kiam la plej granda parto de la novaj vortoj estos jam tute matura, ia aŭtoritata institucio enkondukos ilin en la vortaron *oficialan*, kiel « *Aldonon al la Fundamento* » [A 7.2].

[„Formoj novaj“]

[8] 2) Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aŭ alia vorto aŭ regulo en nia lingvo estas tro neoportuna, ĝi ne devos forigi aŭ ŝanĝi la diritan formon, sed ĝi povos proponi formon novan, kiun ĝi rekomendos uzadi paralele kun la formo malnova [A 8.1]. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos arĥaismo, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo [A 8.2]. Sed, prezentante parton de la fundamento, tiuj ĉi arĥaismoj neniam estos elĵetitaj, sed ĉiam estos presataj en ĉiuj lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eĉ ĉe la plej granda perfektigado la unueco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eĉ el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj [A 8.3].

[Monopolo por plivastigo de la Fundamento - efektiva neceseco]

[9] Mi montris en principo, kiamaniere la severa netuŝebleco de la « Fundamento » gardos ĉiam la unuecon de nia lingvo, ne malhelpante tamen al la lingvo ne sole riĉiĝadi, sed eĉ konstante perfektigadi [A 9.1]. Sed en la praktiko ni (pro kaŭzoj jam multajn fojojn priparolitaj) devas kompreneble esti tre singardaj kun ĉia « perfektigado » de la lingvo [A 9.2]: a) ni devas tion ĉi fari ne facilanime, sed nur en okazo de efektiva neceseco [A 9.3]; b) fari tion ĉi (post matura prijuĝado) povas ne apartaj personoj, sed nur ia centra institucio, kiu havos nedisputeblan aŭtoritatecon por la tuta esperantistaro [A 9.4].

[Resumo]

[10] Mi finas do per la jenaj vortoj [A 10.1]:

1. pro la unueco de nia afero ĉiu bona esperantisto devas antaŭ ĉio bone koni la *fundamenton* de nia lingvo [A 10.2];

2. la fundamento de nia lingvo devas resti por ĉiam netuŝebla [A 10.3];

3. ĝis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus *pligrandigi* (neniam *ŝanĝi!*) la ĝisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aŭ reguloj, ĉio bona, kio ne troviĝas en la « Fundamento de Esperanto », devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel rekomendata [A 10.4].

[La „ideoj“ de la Antaŭparolo; Propono al UK 1]

[11] La ideoj, kiujn mi supre esprimis pri la Fundamento de Esperanto, prezentas dume nur mian *privatan* opinion [A 11.1]. Leĝan sankcion ili ricevos nur en tia okazo, se ili estos akceptitaj de la unua internacia kongreso de esperantistoj, al kiu tiu ĉi verko kune kun sia antaŭparolo estos prezentita [A 11.2].

L. ZAMENHOF. [A 11.3].

Varsovio, Julio 1905. [A 11.4].

La Esperanto-Akademio (<ea>)

Laŭ la preskriboj de la Antaŭparolo estis fondita „aŭtoritata centra institucio“ (ACI) por gardi la unuecon de Esperanto, ĝisdatigi („pligrandigi“) la Fundamenton kaj konsili pri „ĝusta“ Esperanto. De 1905 tiun taskon plenumis la *Lingva Komitato*, de 1948 la *Akademio de Esperanto* (AdE).

De kelkaj jaroj, plimulto de la nunaj „akademianoj“ ne plu agas „aŭtoritate“. Ili nome decidas kaj konsilas laŭ principoj kaj kriterioj aliaj ol tiuj de la Fundamento, aŭ eĉ propagandas kontraŭfundamentan varianton de Esperanto.⁶⁴ Tiel ekestis la situacio, ke la esperantistoj nuntempe fakte ne havas oficialan aŭtoritan institucion, servante al ili pri lingvaj demandoj. En la realo, la grupo nomanta sin „AdE“ estas nura cirklo de privatuloj en la senco de A 3. Por kompensi tiun misan situacion ekestis la nova „Esperanto-Akademio“ (<ea>). Ĝi celas mildigi la neekziston de funkcia ACI per instrua kaj kleriga programo pri la Bulonja Deklaracio, la Fundamento kaj „ĝusta“ Zamenhofa Esperanto en la senco de tiuj dokumentoj.

⁶⁴ Tion montras ekzemple kaj i.a. la aktuala Statuto de 2016, la „Kromdeklaro pri la nomoj *Zamenhof* kaj *Vaŝington*“ (OI 22, 2013), la enkonduko al OA 9, multaj respondoj de la „Konsultejo“ kaj eĉ pli multaj opini-esprimoj de „akademianoj“ (inter ili eĉ estraranoj) en publikaj lingvaj diskutoj. Detalojn vd. en BK I.

Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto

(BK)

Superrigardo pri la volumoj

(Stato de Julio 2016)

N.	N.	Titolo / Enhavo	Mil.	Eld.	Rimarkoj
I.	1.	Bulonja Deklaracio, Antaŭparolo, Gramatiko, Ekzercaro kaj Ĝenerala Parto de Vortaro Oficiala	BD – A – FG – FE – VO	4a	Jul. 2016
II.	2.	Vortaro Oficiala – Listo de la Oficialaj Vortoj	VO	6a	Jul. 2016
III.	3.	Zamenhofa Uzado. Kelkaj Misinterpretoj	Z - Mis	1a	Antaŭe parte en BK I
IV.	4.	Akademia Dokumentaro	AD	1a	Kolekto de decidoj de la Lingvaj Institucioj ekde 1905
V.	5.	Akademia Nomaro	AN	1a	Membroj de Lingva Komitato kaj Akademio
VI.	6.	Lingvaj Respondoj	LR	8a	Kompletigita kaj rearanĝita
VII.	7.	Vortaro de Kabe 1910	Kabe	3a	Komentita kun listo de geografiaj kaj propraj nomoj de Kabe el 1910
VIII.	8.	Vortaro Esperanto- Franca de De Beaufront 1904	Beau		aperonta
IX.	9.	Jürgensen-Vortaro Esperanto-Germana 1904	ED 1		aperonta

Eksterserie

BKB	Berlina Komentita Bibliografio de la Vortaroj kaj Terminaroj de Esperanto 1887-2014	2a	Jul. 2016
BVM	Berlina Vortaro de Mallongigoj kaj Sigloj en Esperanto		aperonta

Ĉiuj volumoj estas senkoste elŝuteblaj de
<http://esperanto-akademio.wikispaces.com/eniro>

La verko

La Fundamento de Esperanto estas la baza verko por decidi pri „ĝusta“ kaj „bona“ Esperanto. La „klasika“ verko de Helmut Velger pri „Norma Esperantologio“ analizas ĝin kaj montras, ke laŭ intenco de la lingvo-kreinto Zamenhof, laŭ strukturo kaj vortumo ĝi estas lingva „leĝo“. Tiu nocio aŭ ĝiaj sinonimoj estas uzataj dek kvar fojojn en la mallonga Antaŭparolo de nur dek unu alineoj. Surbaze de tiu ekkono Velger konsekvence aplikas metodojn de jura norm-interpretado al lingvaj demandoj. Farante tion, li venas al la samaj respondoj pri „ĝusta“ kaj „bona“ lingvo-uzado, al kiuj venis Zamenhof antaŭ jarcento - forta indico, ke la kvazaŭjura metodo estas tiu de Zamenhof mem. — La studo de Velger el 1999 dum multaj jaroj estis nur malfacile akirebla. La reeldono celas popularigi ĝin kaj donas superrigardon pri la daŭrigo de la diskuto ĝis 2016.

La aŭtoro

Helmut Velger (germane *Welger*, 1946-2008) estis germana psikologo, psikoterapeŭto kaj juristo. Li fondis „eldonejon por kosmopolita humanismo (homaranismo)“, kiun li gvidis ĝis sia frua morto pro nekuracebla malsano. Kadre de siaj studoj pri la Zamenhofa homaranismo li remalkovris kaj sisteme klarigis la Zamenhofan metodon por veni al juĝoj pri lingva „ĝusteco“ kaj „boneco“ de Esperanto.

La reeldonanto

Bernhard Pabst (1960) estas germana juristo kaj aŭtoro de la plurvoluma Berlina Komentario pri la Fundamento de Esperanto, la nuntempe plej ampleksa kaj detala konsultverko pri ĉiuj demandoj ĉirkaŭ la Fundamento.